


(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361 2 1996

中國報道

EL POPOLA ĈINIO





Konvolvulo

Foto de HAN HONG

INTER NI

Dum multaj jaroj mi regule ricevis kaj legis la revuon EPĈ, post trastudado ĉiam mi transdonis ĝin al aliaj personoj. En la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto mi okupiĝas i.a. pri etnaj problemoj. Mi ĝojus, se vi publikigus pli multajn kaj pli detalajn artikolojn pri la historio kaj kulturo de nacimalplimulto el Ĉinio.

JENŐ ZÁGONI
(Hungario)

La pliboniĝo estas konstanta kaj pli abundas Esperantaj temoj. Mi persone nur bedaŭras la malaperon de ŝatataj "humuraj paĝoj", amuzaj karikaturoj kun interesaj distraĵoj, proverboj ktp.

LLUÍS ARMADANSI
MARFÀ (Hispanio)

La revuo EPĈ eble estas pli legata ekster Ĉinio ol en la lando, pro tio iom pli da artikoloj, kies temoj estos fremdaj al Ĉinio, allogos pli da esperantistoj.

ANDRÉ LOISEL
(Francio)

Min interesas artikoloj pri la socia vivo de ĉinoj. Lastatempe tio iomete mankas al mi. Ekz. kiom da laborhoroj havas la tago de ĉinaj laboristoj, oficistoj, kamparanoj, kiom da jaroj ili devas labori por akiri la rajton de emeritiĝo, kiel alta estas la emerita enspezo kompare kun la ricevitaj salajroj, kian asekurecon en kazo de malsano, akcidento ktp ili ĝuas.

ERNST QUIETENSKY
(Aŭstrio)

La gazeto EPĈ ne havas raportojn pri Afriko.

MICHAEL ANTHONY
(Tanzanio)

La de vi jam publikigitaj tekstoj nur supraĵe informis. Mankas detaloj, kiuj altiros la intereson ankaŭ de neesperantistoj.

GEORGO O VASKE
(Brazilo)

ENHAVO

2 *INTER NI*

4 Komputeroj en Ĉinio

6 La Ĉina Naĝista Teamo sin preparas por Atlanta

8 Por savi la Klinitan Turon de Pizo

9 *ĈINAJ E-ISTOJ:*

Mao Zifu, Esperanta poeto sur rulseĝo

11 *ORIGINALE VERKITAJ:*

Dezertulo

14 *ESP-NOVAĴOJ*

15 *POR KOMENCANTOJ:*

Meznokta sonorado

16 Xinjiang en rapida disvolviĝo

20 Vortenigmo

21 *NUNTEMPA BELARTO:*

Strebado de pentristo Huang Anren

24 En vilaĝo de rakontistoj

26 Somerumejo Mogan-monto

28 Amikeco

29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*

Xi'an, la komenco de la Silka Vojo

36 En la loko fore de la sekulara mondo

38 *MULTNACIA ĈINIO:*

Nyingchi sur la monda tegmento

40 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*

Pri advokateco de Ĉinio

42 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*

Konfuceanismo en la vivo de ordinaraĵ ĉinoj

44 Mezlernejoj en someraj ferioj

46 *KURANTAJ AFEROJ*

48 *POR VIA SANO:*

Masaĝo en la ĉiutaga vivo (IX)

49 Mistera Lugu-lago

50 *GALERIO:*

Pentraĵo "Ĉe Bianhe-rivero en la Festo de Klara kaj Helo"

SUR LA KOVRILCO:

Dancistino Foto de **Han Hong**


2 Konvolvulo

SUR LA DORSKOVRILO:

En frosta vintro

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Wujiagou-vilaĝo (p. 24)
2. Horqin-stepo (p. 28)
3. Changde (p. 9)
4. Lugu-lago (p. 49)
5. Nyingchi-gubernio (p. 38)
6. Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono (p. 16)



Komputeroj en

EN 1985, 40 jarojn post kiam la unua mikrokomputero aperis en la mondo, ĉinoj elfaris sian mikrokomputeron. Oni ne atendis, ke post longatempa malrapida disvolviĝo la ĉina komputera industrio impetis en la unuaj 5 jaroj de la 9-a jardeko. Kun rapida ekspansio de la komputera merkato, komputeroj aplikigas preskaŭ en ĉiuj kampoj, inkl. de esploro de plej avangardaj sciencoj, ŝtataj financoj, personara kaj familia administrado.

DE LA NASKIĜO DE LA UNUA KOMPUTERO

Transskribado de ĉinaj ideogramoj kaj inform-traktado estas la plej malfacila problemo por ĉinoj en aplikado de komputero. Ĉinoj elfaris la unuan komputeron Changcheng 0520CH ĝuste por solvi tiun problemon. Ili unuafoje aplikis la matrican integran cirkviton por fari ĝin. Ĝi povas komplete trakti ĉin-ideogramajn informojn. Ĝi rompis la strukturon de sistemo IBM PC/XT, kiu tiam

okupis la norman pozicion de industrio, efektivigis altrapidan montriĝon de granda kvanto da ĉin-ideogramaj informoj, kaj tiel ĉin-ideograma traktado de komputero fariĝis aplikebla. Unu jaron poste, la kvanto de mendoj de 0520CH jam superis 15 000. 10 jarojn poste, la kompanio de la komputero havis 200 000 klientojn kaj fariĝis forta grupo Changcheng de Ĉinio tiurilate.

Kun disvolviĝo de la grupo Changcheng, la komputera kaj softvara industrioj de Ĉinio havis rudimentan formon. Nun Ĉinio povas ekspluati kaj pogrande produkti mikrokomputerojn, malgrandtipajn kaj mezgrandtipajn komputerojn. En 1995 la jara komputer-industria produktovalore atingis 50 miliardojn da juanoj. Tabulo de procezilo, klavaro, ekrano, printilo kaj aliaj gravaj partoj kaj periferiaj produktoj de komputero jam vendiĝas en la internacia merkato. Krome, Ĉinio rikoltis multe da gravaj fruktoj en ekspluato de novaj produktoj, kiaj superkomputero Lakta Vojo II kun miliardo da operacioj sekunde, grandskale paralela komputera sistemo Shuguang 1 000, supera mikrokomputero 586 kaj aparato pri magnetdiskoj en grandeco de 5.25 coloj.


Menciindas, ke Ĉinio faris grandan progreson ankaŭ en ekspluato de soft-

varoj de komputero. Koncerna fako konigis, ke en Ĉinio funkcias pli ol 200 entreprenoj de softvaroj, kaj la jara vendokvanto de softvaroj konsistigas pli ol 20% de tiu de la komputera industrio de Ĉinio. En la lastaj dek jaroj Ĉinio ekspluatis milojn da softvaraj sistemoj, el kiuj iuj plenigis la enlandan blankon kaj aliaj cirkulas paralele kun la mondaj. La sukcesa elfaro de la serio de framaj softvaroj SCOP, kiel sistema softvara platformo de ŝtata ŝlosila projekto, fundamentis la laboron por pluapaŝa ekspluato laŭ la nova softvara inĝenierio kaj ekspluato de praktika serio de framaj softvaroj kun ekskluziva rajto de Ĉinio. Fakuloj opiniis, ke la softvaroj reprezentas la estontecon de disvolviĝo de la novgeneracia softvara tekniko. Aplikante tiun teknikon, oni povas ne nur efektiviĝi laŭskalan ekspluaton de aplika softvara sistemo, sed ankaŭ malaltigi la produktokoston kaj garantii la kvaliton. Tial, la naskiĝo de la serio de framaj softvaroj SCOP vidigas novan esperon al la ĉinaj ekspluatantoj de softvaroj.

PRODUKTI ILMAŝINON PER KOMPUTERO

Komputera tekniko rapide disvastiĝas en Ĉinio. Preskaŭ ĉiuj redakcioj de Ĉinio kompostas komputere kaj redaktoroj verkas kaj kompilas per komputero; ĉiuj magazenoj kaj vendejoj enkasigas per komputero; oni komunikas per program-regata telefono kaj uzas aŭtomatan monpagilon en banko; arkivoj kaj materialoj en biblioteko estas laŭvole konsulteblaj komputere; naskiĝis mo-

En vendejo de komputeroj



Ĉinio



Kompostado per komputero

derna informa vojo kaj multimedio... Ĉio ĉi aperis en la lastaj kelkaj jaroj. Dank' al disvastigo de la komputera tekniko, Ĉinio faris grandan paŝon al la informada socio. Samtempe, komputero ankaŭ alportis grandajn ekonomian kaj socian profitojn.

En aplikado de diversaj komputeroj estas grave reformi malnovajn maŝinekipaĵojn per komputero por aŭtomatigi industriajn produktadon. En la pasintaj dek jaroj Ĉinio reformis pli ol 50 000 ilmaŝinojn, 5 000 ŝlosilajn ekipaĵojn kaj produktajn liniojn kaj 6 000 industriajn fornojn. Oni ricevis ĝojgajn progresojn en produktado de industriaj robotoj, daten-regataj ilmaŝinoj k.a. La Unua Pekina Ilmaŝina Fabriko sukcese elfaris komputeran integr-fabrikadan sistemon kaj fabrikis ilmaŝinojn per komputero. En maŝinejo de la fabriko oni vidis, ke laboranto de la fabriko startigis la komputeran sistemon laŭ la skizo de pecoj desegnita de kliento. Kiam la kliento venis al la laborejo, duonproduktoj de la pecoj estis jam portitaj per aŭtomata ĉareto al delikata produktolinio por prilaborado. Oni vidis sur komputera ekrano kaj travidebla ŝirmilo, ke la pecoj estas malvarmigataj en likvaĵo. Du horojn poste, ŝlosila peco de frezmaŝino estis farita laŭ la skizo. Mi informiĝis de fabrikanato, ke tiu komputera integr-fabrikada sistemo povas mallongigi ekspluatitan periodon de produkto je $1/3 - 1/2$, kaj altigi prilaboran potencon de pecoj je 4-8 obloj. Nun la fabriko per la sistemo ellaboris administran,

produktan kaj laboran planon kaj per ĝi regas la produktokoston. Sen desegnaĵo la du delikataj produktolinioj kaj la prilabora centro povas produkti ilmaŝinojn, komandate de komputero.

Kun konstruado de la projekto de moderna informa vojo sur la ter globo necesas, ke la homaro iru al informigo kaj komputera retigo. Rekonendas, ke kuŝas granda distanco inter Ĉinio kaj evoluintaj landoj tiuflanke, tamen Ĉinio ne forlasis la ŝancon. Nun Ĉinio faras serion da konstruoj por la moderna informa vojo. Ekz., la or-ponta konstruo estas fundamenta instalaĵo por la informigo de la nacia ekonomio kaj la or-ponta reto — telekomunika reto por la ŝtata makroreguligo de ekonomio kaj kuna utiligo de riĉfontoj de ekonomio kaj sociaj informoj. La reto jam ekfunkciis lastjare unue en 24 provincoj kaj municipoj, kiaj Pekino kaj Ŝanhajo. Ĝi liveras ekonomiajn, profesiajn kaj lokajn informojn, informojn pri ĉiutagaj vivservoj kaj aliaj landoj. La or-ponta reto jam identiĝis kun la internacia komputera reto plej granda en la mondo.

KOMPUTEROJ EN ORDINARAJ FAMILIOJ

Ke komputeroj uziĝas en familioj, tio plej elokvente atestas populariĝon de komputeroj en

Ĉinio. Laŭ statistiko, ĉ. 600 000 familioj en Ĉinio havas komputeron de 286 aŭ 486.

Inter la multspecaj hejmaj komputeroj la plej vaste uzata estas tiu por vortotraktado, sekve komputero fariĝis fidela akompananto de lingvistoj. Iu verkisto, kiu uzis komputeron, diris kun emocio, ke antaŭe li devis skribi sur dikega kajero pli ol 200 000 ideogramojn por verki novelon, sed nun por tio jam sufiĉas maldika disko. Komputero estas bona helpanto ankaŭ por inĝenieroj, projektistoj kaj natur-sciencistoj. Per komputero ili povas plenumi multe da laboroj hejme.

Hejmaj komputeroj alportas multe da oportunoj kaj intereso al la familia vivo. Ekz., oni povas ludi kaj disponi familiajn el-kaj enspezojn per komputero. Fakte, nemalmultaj familioj aĉetis komputeron nur por la infanoj. Ili esperas, ke iliaj infanoj povos posedi novan teknikon kaj la komputero fariĝos guvernisto por ili. Komprenoble, tio ne estas malfacila, se estas konvena softvaro. Sed en Ĉinio ne estas ideala la utiligo de komputera povo. Ĉar Ĉinio komencis ekspluati softvarojn kompare malfrue kaj al ĝi mankas komputeraĵoj. Tamen la utiligo de hejmaj komputeroj en Ĉinio havas belan perspektivon. ■

La Ĉina Naĝista Teamo sin preparas por Atlanta

EN la 25-aj Olimpikoj en Barcelono ĉinaj naĝistinoj gajnis kvar orajn kaj kvin arĝentajn medalojn kaj rompis du mondajn rekordojn. Poste en la monda naĝa ĉampionea konkurso en Romo ili gajnis 12 el la 16 oraj medaloj kaj estis multe atentataj de la monda naĝista rondo. Kiamaniere ili gajnis la sukceson? Ĉu ili sukcesos en la 26-aj Olimpikoj okzontaj en Atlanta en 1996? Por sciigi pri tio, mi intervjuis s-ron Lin Senlin, gvidanton de la Ĉina Naĝista Teamo kaj s-ron Chen Yunpeng, ĝian ĉeftrejniston.

LERNI DE ALILANDAJ TREJNISTOJ

En 1986 kaj 1987 la Ĉina Naĝista Teamo engaĝis du germanajn trejnistojn, kiuj alportis avangardajn trejn-metodojn, kia trejniĝo sur altebenaĵo. Fine de 1990, olimpika ĉampiono de Sovetunio venis al Ĉinio por trejni la Hubei-an Naĝistan Teamon.

Estante sportisto, s-ro Chen Yunpeng estis trejnata de hungara trejnisto kvar jarojn. En 1980 li studis pri naĝ-instruado en Usono. En 1983, sub lia gvido ĉinaj naĝistoj venis al la Aŭstralia Sporta Instituto kaj estis trejnataj tri monatojn de la fama usona trejnisto Passeley, kiu kumule funkciis kiel trejnisto de la Aŭstralia Naĝista Teamo. En 1989 li vizitis Hungarion por esplori trejnadon de ĝiaj naĝistoj.

Ĉinio invitis ankaŭ eŭropajn kaj usonajn fakulojn fari prelegon kaj plurfoje sendis fakulojn kaj sportistojn esplori kaj trejniĝi en Eŭropo kaj Usono.

La Ĉina Naĝista Teamo rimarkinde progresis en la lastaj jaroj. Unu el la kialoj estis alpreni avangardajn trejn-metodojn. Tio estis kombini spertojn de Eŭropo, Usono, eksa Demokratia Germanio kun tiu de Ĉinio, krei kompletan da novaj teorioj de trejnado.

NOVAJ TEORIOJ DE TREJNADO

Naĝado estas farata kun la korpo tenata horizontale. Laŭ testo farita de la Usona Kosmonaŭtika Buroo, en ekvilibra stato la kora volumeno de la homo estas je 11.8% pli granda ol tiu en stara stato. En pezo-perda stato la kora volumeno de la homo estas je 34% pli granda ol tiu en normala stato. La naĝisto havas medion similan kaj en akvo kaj en pezo-perda stato. La rezisto, kiun devas venki la homo en akvo, estas 800-oble pli granda ol tiu en la aero. La rezisto de irado far objekto en akvo proporcias kun kvadrato de rapido. Surbaze de tio, s-ro Chen Yunpeng prezentis serion da novaj teorioj en la 80-aj jaroj.

Laŭ la tradicia teorio naĝado estas sportobranĉo, kiu multe dependas de kardiovaskula funkcio. En praktikado s-ro Chen Yunpeng montris, ke naĝado estas sportobranĉo, kiu ĉefe dependas de muskolaj fortoj kaj eltenemo, sed malmulte dependas de kora kaj pulma funkcioj. Por rapida naĝado nepre

necesas fortaj muskoloj. Por tiu celo li faris grandampleksan trejnadon surteran kaj surakvan, testis fiziologiajn normojn kun la muskola kiel la ĉefa, decidis la intensecon de trejnado surbaze de la muskola sento kaj multe masaĝis la naĝistojn por malstreĉi iliajn muskolojn.

Laŭ la tradicia teorio la ĉinaj naĝistoj postigās en mallonga-distanca naĝado pro nesufiĉa eltenemo. Post esplorado s-ro Chen Yunpeng venis al la konkludo, ke la postiginteco estas kaŭzita de malalta rapido kaj la ŝlosilo por altigi rapidon estas intensigi forton. Por atingi la celon li alprenis serion da metodoj destinitaj por levi la ĉiufankan forton, specialan forton kaj pezan forton.

Kaj krome laŭ la tradicia teorio oni elektis sportistojn laŭ ties staturado kaj konstitucio. Tamen, surbaze de la aparteco de naĝado, s-ro Chen proponis elekti sportistojn laŭ ties naĝkapablo kaj sento en la akvo. Li opiniis, ke la grava paŝo por plialtigi la nivelon de ĉinaj na-

ĝistoj estas plilongigi la sportistan vivon de elstaraj naĝistoj.

En malpli ol 10 jaroj s-ro Chen Yunpeng prezentis ĉ. 20 tezojn pri trejnado. Trejniĝinte laŭ tiuj teorioj, multaj ĉinaj naĝistoj estis premiitaj en mondaj konkursoj.

JUNAJ NAĜISTOJ EN KRESKO

Post la 25-aj Olimpikoj Yang Wenyi, Lin Li kaj aliaj eminentaj ĉinaj naĝistinoj forlasis naĝejon. Kvankam aperis nemalmultaj junaj naĝistinoj, tamen la ĉina virina teamo estas malpli forta ol antaŭe. Post konkursoj en la dua duono de 1995 aperis multaj junaj naĝistinoj preskaŭ en ĉiuj sportbranĉoj de naĝado. S-ro Chen Yunpeng rigardas ilin kiel esperon de Ĉinio. Ili rimarkinde progresis en trejniĝo pri discipliniteco, lerteco, sento en la akvo kaj psiko. Iuj el ili partoprenos en la 26-aj Olimpikoj.


Por pravigi siajn vidpunktojn s-ro Chen ekzemplis per ciferoj. En la unuaj 10 lokoj de la mon-

da konkurso pri virina 100-metra rapidnaĝo ĉinoj kaj usonanoj okupis po tri. En la monda konkurso pri virina 4×100-metra stafeta rapidnaĝo la ĉina teamo okupis la duan lokon, post la usona. En la monda konkurso pri virina 4×100-metra stafeta mikснаĝo la ĉina teamo okupis la trian lokon, post la usona kaj aŭstralia. La elstaraj naĝistinoj de la ĉina teamo aĝas 17-20 jarojn. S-ro Chen Yunpeng diris: "Se elstaraj ĉinaj naĝistinoj atingos 97% de sia plej alta nivelo en trejniĝo de 1995 kaj junaj naĝistinoj stabile progresos, do ĉinoj eble gajnos medalojn en la 26-aj Olimpikoj."

Restas malpli ol 10 monatoj antaŭ la 26-aj Olimpikoj. Kiel do devas taksi sin mem nun la ĉinaj naĝistinoj? S-ro Chen Yunpeng opinias, ke ili povas rivali kun fortaj naĝistinoj de la mondo en la 50-metra kaj 100-metra rapidnaĝoj, 100-metra kaj 200-metra papilnaĝoj, 100-metra kaj 200-metra dorsonaĝoj kaj tri mondnivelaj stafetaj naĝoj. Se ili diligente trejniĝos kaj firmigos sian memfidon, do eblos por ili atingi bonajn sukcesojn en Atlanta.

Same kiel en aliaj sportbranĉoj de Ĉinio, en la ĉina naĝista rondo ekzistas la fenomeno, ke la viroj estas malpli fortaj ol la virinoj. S-ro Chen Yunpeng analizis, ke tion kaŭzis la faktoroj de socio, familio, edzeco kaj staturado. Ĉinio multe ekspluatis la latentajn fortojn de la virina sporto. La staturado de ĉinaj naĝistinoj estas iagrade simila al tiu de elstaraj naĝistinoj de aliaj landoj, sed tiu de ĉinaj naĝistoj estas evidente malpli alta. Nun la trejnistoj de la Ĉina Naĝista Teamo penas trovi metodojn por kiel eble plej efike trejni la viran teamon. ■

Trejnistino kaj naĝistino



BING CHUAN:

Por savi la Klinitan Turon de Pizo

LAŭ invito mi venis en la 4-an etaĝon de loĝdomo de instruistoj. Mi frapis je la pordo kaj venis akcepti min maljunulo kun grizaj tempiaj haroj kaj en presbio-paj okulvitroj. Li aspektis multe pli maljuna ol fakte li estis. Ĉu li estas fama inĝeniero s-ro Jiao Wuyi (Ĝjaŭ Uji), kiu donis efikan proponon por savi la Klinitan Turon de Pizo kaj restarigis multajn falontajn konstruaĵojn? Estis malfacile por mi asocii tiun maljunulon kun la eksterordinara inĝeniero.


Salutinte lin, mi eniris en lian duĉambran apartamenton, kie krom lito troviĝis ankaŭ grandaj kaj malgrandaj ŝrankoj plenaj de libroj. Sur la skribotablo ĉe fenestro estis komputero. Sur la muroj pendis pli ol 20 diversaj silkaj flagoj donitaj de profitantoj honore al lia teorio de ŝnura modulo.

Pli-ol-60-jara Jiao Wuyi estas emerita instruisto de la Arkitektura Instituto de Nordokcidenta Ĉinio. Li estas modesta. Parolante pri la teorio de ŝnura modulo, li emociiĝis kaj kvazaŭ rejuniĝis.

En la instituto s-ro Jiao dubis pri la tradicia leŭsa teorio. Oni scias, ke la fundamento subtenas la pezon de konstruaĵo. Fakte, ĉiu konstruaĵo sinkas nerimarkite. Se la fundamento sinkas serioze, do la konstruaĵo fendigos kaj eĉ falos. Laŭ la leŭsa teorio, por eviti sinkadon, oni devas pligrandigi aŭ profundigi la fundamenton el leŭso, sekve tio multe malŝparigas la koston de konstruaĵo kaj la peza fundamento rapidigas sinkadon.

Antaŭ pli ol 20 jaroj, post multjara studado pri leŭsa geologio, s-ro Jiao Wuyi elpensis teknikon pri esplorado kaj projektado de fundamento el leŭso — la teorion de ŝnura modulo. Dank' al tio, solviĝis la malfacilo en mezurado de sinkado de fundamento el leŭso.

En 1968 oni trovis, ke 55-metra fumtubo en tegola fabriko de Xi'an (Ŝji'an) kliniĝis ĉ. unu metron en 3 jaroj. Fakuloj ne povis elpensi efikan projekton, ĉar ne eblis al ili mezuri la sinkadon de la fumtubo. Poste, ili aplikis la teorion de Jiao Wuyi kaj ŝarĝis



S-ro Jiao Wuyi

la fundamenton. Kiam la ŝarĝo atingis 151 tunojn, la klinita fumtubo ree vertikaliĝis. Laŭ kalkulo de Jiao, por ree vertikaliĝi la fumtubon la ŝarĝo devis esti 150 tunoj. La fakuloj admiris lian kalkulon. Tio estis la unuafoja apliko de la teorio en savado de konstruaĵo. Krome, Jiao sukcesis ankaŭ en kalkulado de sinka kvanto de grandaj olecisternoj en Ŝanhajo, Tianjin (Tjanĝin) kaj aliaj urboj. En la sekvan-taj pli ol 20 jaroj s-ro Jiao solvis la problemon pri sinkado de la fundamentoj de pli ol 200 konstruaĵoj kaj malkovris kaŝitajn danĝerojn de iuj konstruaĵoj tiurilate. Sole en 1994, la teorio de ŝnura modulo estis aplikita en dekelkaj konstruaĵoj kaj ŝparigis milionon da juanoj.

En novembro 1993, "Nov-Jorkaj Tempoj" raportis, ke sukcesis la protektado de la Klinita Turo de Pizo kaj ĉesis la malrapida kliniĝado, kiu daŭris 800 jarojn. Post nelonge, s-ro Jiao ricevis leteron de prezidanto de la Internacia Komisiono por Protekti la Klinitan Turon de Pizo. En ĝi li dankis s-ron Jiao pro lia propono kaj informis lin pri la nuna ŝarĝo kaj sinkado de la turo.

De la komenco de la 20-a jarcento multaj sciencistoj donis proponojn kaj provadis ilin por savi la altvaloran historian objekton, tamen la proponoj ne bone efikis. Por pruvi sian teorion s-ro Jiao Wuyi per la ŝnura modulo kalkulis la sinkan kvanton kaj klingradon de la turo en diversaj periodoj de la 800 jaroj. La rezulto preskaŭ samis kiel tiu mezurita. La 21-an de decembro 1980, li proponis al la preĝejo de Pizo ŝarĝi la fundamenton en kontraŭa direkto de la kliniĝo.

En la 20-a de novembro 1994 s-ro Jiao donis novan proponon al la komisiono por plue stabiligi la turon: Kiam la ŝarĝo atingos 600 tunojn, oni povos pliiĝi la ŝarĝon je 300-600 tunoj. En septembro 1995 la Klinita Turo de Pizo subite rekliniĝis, oni metis pliajn 150 tunojn da plumboj sur la ekvilibriĝan 600-tunan ŝarĝon. Tio denove montris la gravecon de la propono.

Jiao Wuyi estas ordinara ĉino. Li esperas, ke la teorio pli multe servos al la tuta homaro. ■

Mao Zifu, Esperanta poeto sur rulseĝo

de WANG HANPING

ESTAS malfacile imageble, ke talenta junulo, kiu subite fariĝis grava paraplegiulo, ankoraŭ havas grandan vivforton. Estas malfacile imageble ankaŭ, ke li ekprenis plumon por fari persistan tamen nere-kompencan penon. Estas pli malfacile kredeble, ke


Mao Zifu en universitataj jaroj



li ne nur superis sin mem, sed ankaŭ ricevis rimarkindajn atingojn en verkado de Esperantaj literaturaĵoj.

Li estas Esperanta poeto Mao Zifu.

Li naskiĝis en 1963 en kamparana familio en Lixian (Liŝjan)-gubernio de Hunan-provinco. La gubernio estis malriĉa kaj ofte suferis de inundo. Tamen la malriĉa vivo havigis al li diligencon kaj firman



Mao Zifu en tajpado

Foto de WANG HANPING

karakteron. Li ĉiam estis elstara lernanto de elementa lernejo kaj mezlernejo. En 1980 li eniris en la matematikan fakultaton de la Hunan-a Normala Universitato.

Mao Zifu ŝatis sporton. Ĉiumatene li ekzercis sin per kurado. Foje li gajnis la unuan lokon en montogrimpa konkurso de sia fakultato. Li estis ĉefa membro de la flugpilka teamo de la fakultato. Tamen li dediĉis pli da tempo al studo. Ĉiutage li legis en la biblioteko plurajn horojn. Ĉiujare li revenis al sia hejmloko por viziti siajn gepatrojn kaj gefratojn nur en vintraj ferioj. Li pasigis somerajn feriojn en la universitato por studo kaj laboro, tiel li povis ŝpari monon kaj enspezi iom por daŭrigi sian studon.

Mao Zifu ŝatis ankaŭ turismon. Tamen pro malriĉeco li malofte ekskursis. En la kvara lernojaro li provinstruis en mezlernejo proksime de Hengshan-montaro. Li kaptis la ŝancon kaj ĝuis la pitoreskan pejzaĝon de la montaro. Antaŭ la diplomitiĝo liaj intimaj amikoj interkonsentis, ke en la sekvanta jaro ili biciklu al la somerumejo Lushan-monto kaj li estu organizanto.

Somere de 1984 Mao Zifu eklaboris en la Changde-a Gongxiao-lernejo de Hunan-provinco. En la lernejo li gvidis kursojn pri matematiko kaj *Basic*. Lia bona instruado ricevis laŭdojn. Tamen post kelkaj monatoj neatendita trafika akcidento ŝanĝis lian tutan vivon.

Mao Zifu neniam forgesos la daton 21-a de marto 1985. Tiutage traktoro koliziis kun li, kiam li biciklis de sia amiko al la lernejo. Kiam li rekonsciĝis, li trovis, ke li kuŝas en hospitala lito, kaj li havis neniom da sento en la korpopartoj sub la brusto. Pro la malbonaj kondiĉoj de la loka hospitalo, lia sanstato ne reboniĝis. Post unu jaro li estis portita al Changsha, la ĉefurbo de la provinco, por daŭra

kuraco. Sed la diagnozo konkludis, ke li neniam restariĝos. Li nevole akceptis la fakton: junulo nur 22-jara dependos tute de aliaj homoj en sia estonta vivo. Granda tristo, eĉ malespero okupis lian kapon. Sed li estis firmvola. Sub la helpo de la lernejo, familianoj, amikoj kaj kolegoj, li pasigis la plej doloran tempon. Lia patrino venis de la hejmloko por prizorgi lin.

Li komencis alian vivon. Lia ĉiutaga vivo dependas de lia patrino. Ĉion li devas lerni de la komenco, kaj la sorto estas tiel severa. Tamen li ne dronis en ĉagrenoj. Li volis per siaj agoj realigi la valoron de sia ekzisto kaj riĉigi sian spiritan mondon.

Li ekprenis Esperantan lernolibron, kiun donacis al li laboristino. Li persiste lernis kaj finis la elementan kaj mezgradan kursojn. Sen gvido de instruisto, sen helpo de sufiĉaj lernomaterialoj, li havis nur unu vortaron kaj la revuon "El Popola Ĉinio". Li legis la revuon, konsultante la vortaron. Tiam li ekkonis la Esperantan metrikon kaj ekinteresiĝis pri Esperantaj poemoj. Poste li havigis al si "Esperantan Antologion (Poemoj)", kiun li tre ŝatis kaj legis foje refoje. Li ekprovis verki poemojn en Esperanto. En 1990 lia poemeto "Majo Suda" estis unuafoje publikigita en "La Mondo", organo de la Ĉina E-Ligo, kio multe kuraĝigis lin. Li ĵetis sin en la Esperantan lernadon kaj verkadon.

En 1990, leginte la E-literaturan gazeton "Penseo" redaktitan de s-ro Shi Chengtai, Mao Zifu skribis al li leteron kun poemo. Ricevinte liajn leteron kaj poemon, s-ro Shi Chengtai tre ĝojis kaj miris. Li neniam aŭdis, ke ĉina junulo verkis poemon en Esperanto. Li tuj respondis al Mao kaj donis al li konsilojn kaj helpon. La ofta korespondado igis ilin intimaj amikoj. Nun preskaŭ en ĉiu numero de "Penseo" troviĝas poemoj de Mao Zifu.

Mao Zifu kaj lia patrino Foto de **WANG HANPING**



Mao Zifu kaj liaj kunlernantoj

Fine de 1993, kuraĝigite de s-ro Shi Chengtai, Mao Zifu sendis tri poemojn al s-ro William Auld. Ĉi tiu tuj respondis al Mao, ke la poemoj tre plaĉas al li kaj li volonte disponigos al Mao unu poezian paĝon de "Monato". Ricevinte la leteron de s-ro Auld, Mao tuj sendis al li 7 poemojn. Tiuj 10 poemoj poste estis aperigitaj en la junia numero de "Monato", 1994. De tiam ili korespondis de tempo al tempo. S-ro Auld kiel onklo helpis lin. Poste Mao sendis al li sinsekve poemojn kaj novelojn. S-ro Auld estis tre ĝoja pro lia rapida progreso en E-verkado. Li laŭdis, ke lia lingvaĵo estas riĉa kaj bildoplena, kaj li jam posedas propran poezian voĉon, kiu estas ne trude avangarda nek imite klasika, sed aŭtentike lia propra. Atente leginte la novelon "Ho Amy", s-ro Auld diris, ke ĝi estas ne nur kortuŝa, sed ankaŭ noveliste matura.

Sub la kuraĝigoj kaj helpoj de Shi Chengtai, William Auld kaj aliaj veteranaj esperantistoj, Mao Zifu ricevis riĉan rikolton en la verkado de E-literaturaĵoj. Liaj poemoj kaj noveloj estis aperigitaj en "Penseo", "Monato", "Heroldo de Esperanto", "La Kancerkliniko", "Literatura Foiro", "Riveroj",

“Fonto” kaj aliaj Esperantaj gazetoj. En 1994 li sendis du poemojn al UEA por partopreni en ĝia belarta konkurso de 1995. Li gajnis la premion “Nova Talento”. Nun pli kaj pli multaj esperantistoj konas lian nomon, sed malmultaj scias, ke li estas kriplulo kaj vivas malfacile.

Por Mao Zifu, en la vivo estas tre multaj malfaciloj kaj ĉagrenoj. Li ne nur ne povas zorgi sian vivon, sed ankaŭ skribas tre malfacile. En 1994 li aĉetis skribmaŝinon. Tamen li ofte mistajpis pro neobeemo de siaj fingroj, kio ege ĉagrenis lin. Li ege deziras komputeron por helpi sian verkadon! Sed lia monata salajro estas malpli ol 300 juanoj. Prizorgante lin, lia patrino devas kolekti eluzaĵojn por vivtenado. Dum tiuj jaroj lia patrino ne revenis al la hejmloko. Rigardante sian maljunan patrinon kaj pensante pri sia sanstato, li ofte demandis sin: “Kiam finiĝos tiu situacio?”

Estas feliĉe, ke la ĉirkaŭaj homoj donis al li multajn helpojn: aĉeti librojn, porti leterojn al poŝtoŭficejo, transporti objektojn, babili kun li kaj donacii al li, kio sentigis al li varmon de vivo. Iu nekonata juna poŝtistino ofte sendis al li poŝtmarkojn kaj kuraĝigis lin. Siavice li ofte helpis najbarajn mezlernejanojn.

Mao Zifu pasigis preskaŭ 11 jarojn en lito kaj rulseĝo, kiu nun estas kaduka. Li tre esperas, ke li denove stariĝos, eĉ en songoj. Tamen pro financa malfacilo la lernejo ne povas subvencii lin por pli efika kuraco. Kaj li ne povas ŝanĝi la staton. Li riĉigas sian spiritan mondon nur per legado kaj verkado.

Li ĉiutage atendas leterojn de amikoj kaj novajn Esperantajn librojn kaj gazetojn. En lia koro neniam estingiĝos espero, kiujn Esperanto alportas al li. ■

ORIGINALE VERKITAJ

Dezertulo

de MAO ZIFU

S-ro Mao Zifu naskiĝis en Hunan-provinco la 14-an de januaro 1963. Li eklernis Esperanton en 1985. De 1990 ĝis nun li publikigis dekojn da poemoj, noveloj kaj komentarioj en ĉinaj kaj alilandaj E-gazetoj. La jenaj tri poemoj estis nove verkitaj de li. En la poemoj li prezentas siajn nunajn statojn, penson, esperon kaj opiniojn pri vivo kaj poezio. Pri la aŭtoro bonvolu legi la artikolon “Mao Zifu, Esperanta poeto sur rulseĝo” en tiu ĉi numero.

La Red.

DEZERTULO

ruino de prakastelo.
ĥato.

hundo tre pli vigla ol leon' mortinta.
dezertulo kun krono dorna.

sub unika palmo
vilaĝo de Nod.
polvo faras brikon

sen pajlo. kaj la sandalo
ĵetiĝas for.

ricevinte jakon kaj mantelon
de onkloj, l' dankemulo
redonas moneron vidvinan:
koro.
birdoj kaj lilioj
atendas la sunan paŭzon.
la semon de mustardo
karesu fermento.

kie estas kolombo
ĉe roĵo? sur la monto
kun aromaj herboj
gazelo kaj cervido?!
la sovaĝanser' ne estu korvo!

fratoj, de vi li prialmozas
la kaŝan manaon.
ĉe la frapo ovru l' pardonon,
antaŭetendu vian manon
dekstran. li akceptas
kukojn aŭ fiŝojn,
kaj eĉ ŝtonon aŭ serpenton —
ĉio por li en l' okuloj pomo.

FLEGMO

laŭ arb' sen branĉoj,
grimpi kiel serpent' nevarma,
malgraŭ fumoj
el buŝ' kaj tubo,
ne por zenito senrivala.

kontraŭ fluo regresiga,
boati velon el olivo,
spite al vent' uest-eosta,
ne por laŭroj
de oro kaj gravuro.

la stelojn ekster galaksio
verŝu en la gorgon.
tra la poroj
injektu l' lumon
antaŭ dekmil jaroj.
litiazoj, anoj al la universo.
eĉ vidadperdiĝus
la okulparo, l' kavoj

fariĝu lampkloŝoj.

aranĝi l' harojn
laŭ ties eco.
iri klingon kvazaŭ turbo.
la dentoj neniam
mordas la langon
propran aŭ alian.

RACIA RIBELADO

simbolon bruligu
por gela korpo
kaj la simbol' stampiĝas
sur volframano koron.

dorsen al la sankto —
nek profanado nek herezo:
buda' nenie ne sin trovas.
la celo sur la globo
estas atingebla
per ne nur unu vojo.

prefere salti kun radia vido
en la puton sekan
ol postkuri blinde
lumulon sur la spur' rutina.
delektas ekspluat' organojn,
eĉ se nenion gajnigas.
sciu, estas specoj
de la vivaĵo: por akuŝi
la idojn ili sin volontas
putrigi.

lasu min levitacii
en ventro jam tro fekunda.

glosolalio post drinkado
kun muz' pli remaĉigus
ol la klaŭz' laŭ liniilo, eble.

kiu pli ŝatas
kvadratan bruston?
kurbe-rompo de l' sperulo
stimulas apetencon.

por vivigo oni tranĉilizas
la bebon ĉe la akceptejo.
budaisma sabro
masakras la sankton
kaj laikon.

majstro kreivinta,
mi volus de vi rabi
la sceptron, kvankam tiu
origine estas nenio.
mi, lamulo, volas
ŝtopi la vakon per vakuo.

filozofa mi ne estas
filozofo. frustracio
igas min stoika.
tempo fluas; aĝo stagnas.
for de la homaro
mi ĝuas, ho, la maron
de la homo.

sur zena sido
troviĝas kuro maratona.

Horaro de Ĉiutaga Esperanta Dis- aŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	KHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.51	7405
		40.16	7470
		30.11	9965
		19.52	15370
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.65	9480
		43.17	6950
11:00-11:30	Japanio, Koreio	43.13	6955
		31.65	9480
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.75	11650
		25.34	11840


Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ruĝdoma Songô

(Volumo I)

“Ruĝdoma Songô” estas unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj la dramoj de Ŝekspiro en Britio. La Esperanta versio de “Ruĝdoma Songô” estas en tri volumoj, inter kiuj la dua kaj tria



estos eldonitaj respektive en 1996 kaj 1997.

Formato: 14 x 22 cm. (bind.) 582 pĝ. kun 72 nigraj ilustraĵoj

Prezo: 26.00 USD

Mendu ĉe: Distribua Fako de EPC

Libroservo de UEA

Nia peranto en via lando




Pakistanaj esperantistoj (la dua kaj la tria de maldekstre) gastas en EPC-redakcio.

- Meze de oktobro 1995 estrarano de la Pakistana E-Asocio s-ro Mian Salam Shany kaj ĝia kasisto s-ro Jawad Latif Butt vizitis la Ĉinan E-Ligon, la redakcion de "El Popola Ĉinio" kaj la Ĉinan E-Eldonejon. Ili ankaŭ diskutis pri kunlaboro kun la Ĉina Junulara E-Asocio. (Yu Tao)

- La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis 3 seriojn da poŝtmarkoj "La 20-jara

Poŝtstampoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto



jubileo de la establo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Tajlando", "La lago Taihu" kaj "La antikva ĉina poŝta stacio" respektive en la 1-a, 20-a de julio kaj 17-a de aŭgusto 1995. La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui.

(Ĝang Linĵuj)

- Jam du jarojn ekzistis malgranda Esperanto-Rondeto ĉe Instituto de Handikapitaj Infanoj en orient-slovacia urbo Košice. Antaŭ nelonge vizitis ĝin la plej fama slovaka pop-muzika grupo Tublanka el urbo Bratislava. Dum ilia preskaŭ du-hora restado en la instituto okazis diskuto pri nekredible diversaj temoj. Verŝajne la plej bela kaj interesa dankesprimado de infanetoj estis ilia danco sur invalid-veturiloj speciale por muzikistoj. (Anetta Smikova)

- Ĉiam pli da studentoj aliĝas al la Esperanto-kursoj en la Popola Altlernejo de Karlskoga, kie oni havas Esperanto-fakon ekde 1988. 25 horojn semajne oni studas en 8-semajna komencanta kurso aŭ en samlonga daŭriga kurso. Multaj restas tutan semestron por ambaŭ kursoj. Aŭtune de 1995 aliĝis tro da studentoj, kaj la fako devis malakcepti multajn aliĝantojn kaj rekomendi novan kur-

son por komencantoj. Jam 33 naciaj partoprenis en la kursoj. La instruado estas tute en Esperanto, kaj jam post du semajnoj la studentoj uzas Esperanton.

(Lars Forsman)

- Bariloche (Argentino), la plej rimarkinda turisma centro en la sudamerikaj landoj, allogas vintre kaj somere milojn da turistoj. Tiu urbeto, ĉirkaŭita de belegaj montoj kaj lagoj, havas nun malmultekostan gastejon, kies estro parolas Esperante kaj traktas esperantistojn kun specialaj simpatio kaj zorgemo. La gastejo "Patagonia Andina" troviĝas en la strato Morales 564 proksime al la urbocentro. Pli malproksime (je 20 km. de la urbo) sur la lagobordo, situas alia esperantista renkontejo la hoteleto "Los Notros", atingebla per la aŭtobuso 20.

(Werner Schad)

- La 29-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazis en Övik, Finnlando komence de aŭgusto 1995. 50 partoprenantoj venis el 4 kontinentoj. La konferenca temo estas "la propedeŭtika valoro de Esperanto". Dum la komitat-kunsidoj la diversaj raportoj estis akceptitaj. Atiljo Orellano-Rojas el Argentino kaj Bruĉjo Casini el Italio estis elektitaj kiel estraranoj de ILEI.

(Stefan Macgill)

Membroj de la slovaka popmuzika grupo kaj handikapitaj infanoj



Meznokta sonorado

de YANG QING

PASINTSOMERE, kiam ni vojaĝis, neatendita inundo subakvigis nian ŝoseon. Por eviti danĝeron, nia aŭto devis veturi laŭ monta vojeto.

Post kelkhora malfacila veturado ni estis for de la inundo, sed ĝuste tiam okazis, ke la radoj de nia aŭto enkotigis.

Mi kaj miaj du kolegoj elaŭtigis por antaŭenpuŝi la aŭton. Ni vane penadis. Estis jam noktomezo kaj regis nur mallumo. Ni dronis en malespero.

Subite unu el miaj kolegoj ekkriis: "Rigardu, tie estas lumo!" Helpate de la aŭtolampoj, ni hastis en la direkto al la lumo.

Tie troviĝis korto de kamparana familio, kies pordo ne estis tute fermita. La orangkolora lamplumo el la korto sentigis al ni varmon. Ni frapis je la pordo. Post momento eliris maljunulo kaj demandis nin, ĉu nia aŭto enkotigis. Li sonigis grandan sonor-

ilon, kiu pendis en la mezo de la korto. Nelonge poste venis multaj kamparanoj. Li tuj kondukis ilin al nia aŭto.

Nia ŝoforo ekfunkciigis la motoron. Sub la ordono de la maljunulo la kamparanoj kune antaŭenpuŝis la aŭton. Ili penis, kriante kriojn nekomprenblajn por ni. Preskaŭ ili ĉiuj estis nudpiedaj. En la korto ili antaŭenpuŝis la aŭton paŝo post paŝo, forviŝante la ŝviton sur sia vizaĝo per mano.

Finfine nia aŭto eliris el la korto, denove sur glatan vojeton. La kamparanoj hurais pro la sukceso. Kelkaj el ili montris al ni la ĝustan direkton por nia sekura veturado. Mi demandis iun kamparanon pri la maljunulo. Li diris al mi kun estimo, ke la maljunulo estas ilia vilaĝestro. En sezono de inundo la lampo en lia korto ĉiam lumas tutnokte, ĉar li bone scias, ke nemalmultaj pasantoj bezonas helpon en tiu sezono. Ĝuste pro tio li pendigis sonorilon malnovan kaj pezan en sia korto. Aŭdinte lian sonoradon, la kamparanoj tuj kolektiĝas en lia korto kaj atendas lian ordonon. La vilaĝestro laboris jam dekelkajn jarojn kaj ankaŭ la sonorilo servis tiom da jaroj. ■



KOREKTO

Legu la bildoklarigon "S-ro Ye Junjian kaj ĉeĥaj e-istoj ĉe la memorŝtono por ESPERANTO-ARBO en 1956" anstataŭ "S-ro Ye Junjian kaj ĉeĥaj e-istoj antaŭ la tombo de Zamenhof en 1956" sur p. 13, 11-a numero, 1995 kaj legu la bildoklarigon "Kolibraro sur floro" sur p. 2, 8-a numero, 1995. Ni kore dankas francajn s-anojn Raymond Boré kaj Guy Tatet pro iliaj afablaj rimarkigoj.

La Red.

Xinjiang en rapida disvolviĝo

LA aviadilo forlasis Urumqi (Urumĉi), la ĉefurbon de la Xinjiang (Ŝingĝang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kaj flugis sudorienten. 10 minutojn poste antaŭ miaj okuloj aperis grandioza monto, sur kiu neĝo brilis en matenaj sunradioj.

Aŭdiĝis milda voĉo de stevardino: "Jen fama Tianshan-montaro, simbolo de Xinjiang, kies totala areo estas pli ol 1.6 milionoj da kvadrataj kilometroj, kun 3 basenoj inter 3 grandaj montaroj: Altaĵo, Tianshan kaj Kunlun, kiuj imponas de oriento al okcidento de Xinjiang. Inter la montaroj etendiĝas la basenoj Ĝunggar, Turpan-Hami kaj Tarim."

Mia vojaĝo daŭris 20 tagojn sur 5 000 km. En tiuj tagoj mi veturis sur stepo, vadis en Gobio. En vinberĝardenoj mi parolis kun ujuguraj kamparanoj...

"BLANKA REVOLUCIO"

En Xinjiang mi ofte aŭdis la vortojn "blanka revolucio", kiuj estiĝis en la loko nur antaŭ kelkaj jaroj, sed ili montris grandan evoluon de Xinjiang.

Pro seka klimato, longa sunbrilado kaj evidenta diferenco de temperaturo tage kaj nokte, Xinjiang estas grava kotonbazo de Ĉinio. En Turpan la koton-kampoj profunde impresis min.

Mia kunvojaĝanto s-ro Chen, tekstila fakulo, diris al mi, ke kotonogenele havas 2 specojn: la mar-insula kaj la kontinenta. En la basenoj Turpan kaj Tarim oni kulturas mar-insulan kotonon, kies fi-

broj estas multe pli longaj ol tiuj de la kontinenta, pro tio ĝia prezo estas 1.5-2-oble pli alta ol tiu de la lasta. Tie la hektara produktokvanto de kotonon estas pli alta je 50% ol tiu meznombra de la tuta lando, tial la regiono estas la plej granda koton-produktejo de Ĉinio.

En la lastaj jaroj la koncernaj departementoj de Xinjiang plene forte disvolvis prilaboradon de kotonon. Ŝanhajo, Jinan (Ĝĵinan), Qingdao (Ĉingdaŭ), Dalian kaj Weifang unu post alia subskribis kun Xinjiang kontrakton pri translokado de spindeloj. Ĝis nun 400 000 spindeloj kaj 8 624 pneŭmatikaj spindeloj estas transportataj en Xinjiang.

Profitante de rapida disvolviĝo de kotonon-produkto, Xinjiang starigis tekstilan industrion kun 1.14 milionoj da spindeloj. Ĝia jara produktov valoro superis 4 miliardojn da juanoj kaj ĝia eksporta valoro atingis 500 milionojn da juanoj. Sed ĝia prilabora kvanto estas malpli ol 1/3 de la totala produktokvanto de kotonon en la tuta regiono. Pro tio Xinjiang penas transloki tri milionojn da spindeloj el oriento.

"NIGRA ESPERO"

En 1956, unu jaron post la fondiĝo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, petrol-ekspluata grupo el 36 junuloj de 8 nacioj venis en Karamay post longa vojaĝo kaj ŝprucigis oleon el la tero. Kaj realiĝis la revo de ĉinoj pri petrolo.

Fine de la 80-aj jaroj la ŝtato investis dekon da miliardoj da juanoj por ekspluati petrolon en Xin-

jiang. Espereble, en Tarim en la suda parto de Xinjiang, Ĝunggar en la norda kaj Turpan-Hami en la orienta estos vastaj ole-kampoj de Ĉinio, kiuj eble povos rivali kun la Persa Golfo en la estonteco.

Ĝis nun oni jam malkovris 38 ole-kampojn en la supre menciitaj 3 basenoj. La 20 el ili konstruitaj kaj konstruataj produktos ĉiujare 15 milionojn da tunoj da nafto. Nun oni aktive disvolvas prilaboradon de petrol-gaso kaj ilian sintezan entreprenadon, unuapaŝe formiĝis la petrol-kemiindustria bazo en la regionoj Urumqi, Karamay-Dushanzi, Korla kaj Zepu kun pli ol 60 avangardaj produktaj instalaĵoj. En la fino de 1995 la kapablo de ĝia unufoja prilaborado de nafto atingis dek milionojn da tunoj.

Vizitante la petrol-urbon Dushanzi kun ole-rafinejoj kiel ĝia ĉefa industrio, mi trovis, ke en la loko funkcias ankaŭ etilena fabriko kun jara produktokvanto de 140 000 tunoj.

La disvolviĝo de petrolo industria alportos al Xinjiang historian ŝanĝiĝon. Laŭ tasko, en 1999 la jara produktov valoro de ekspluatado kaj prilaborado de petrolo kaj gaso en la tri basenoj atingos 28.8 miliardojn da juanoj kaj superos 40% de la totala industria produktov valoro de Xinjiang en la sama tempo. Kaj la jara produktokvanto de nafto atingos 24 milionojn da tunoj kaj tiu de gaso, 2 miliardojn da kubmetroj en la jaro 2000.

LA TRAFIKA EVOLUO

Antaŭ dekelkaj jaroj mi vizitis Xinjiang. Tiam mi sentis, ke Xinjiang estis tre malproksima de



Parto de Urumqi

Foto de SHEN QIAO

Pekino pro maloportuna trafiko. Eĉ en Xinjiang mem la trafiko estis malfacila. Mi klare memoras, ke mi devis veturi 5 tagojn de Urumqi per aŭtobuso por atingi Kashi en suda Xinjiang.

Tiam mi informiĝis en Hotan, ke komence de la 50-aj jaroj por viziti prezidanton Mao Zedong ujugura kamparano Kurban Turum de Hotan-gubernio devis rajdi sur azeno al Pekino, kun lokaj produktaĵoj. Tio montris unuflanke la amon de la popolo en landlima regiono al prezidanto Mao kaj aliflanke la veran historion de tiu periodo: en multaj lokoj de Xinjiang ne estis trajno nek aŭtobuso kaj azeno servis kiel ĉefa trafikilo.

La maljunulo Kurban jam forpasis. Li ja ne povis scii, ke nun aviadilo povas transporti pasaĝerojn de lia hejmloko al Pekino nur en kelkaj horoj.

En la nuna Xinjiang vojaĝi per aviadilo estas tute ordinara afero. En suda Tarim estas Ĉjemogubernio, duono de kies vojaĝantoj veturas per aviadilo. S-ro Zhang Ruipu, direktoro de la Xinjiang-a Aviada Kompanio, diris al mi, ke en la lastaj 10 jaroj oni malfermis ne nur 16 enlandajn aerliniojn de Urumqi al Pekino, Ŝanhajo, Kantono, Chengdu kaj aliaj urboj, sed ankaŭ 4 internaciajn aerliniojn de Urumqi al Moskvo, Islamabado, Taŝkent kaj Alma-Ata.

Jam finkonstruiĝis la Urumqi-a Flughaveno kaj ekfunkciis pli ol 10 grandaj kaj mezgrandaj novaj pasaĝer-aviadiloj, kiuj transportas 1.05 milionojn da pasaĝeroj jare.

En 1955, kiam fondiĝis la Xinjiang-a Ujugura Aŭtonoma Regiono, tute ne estis fervojo en Xinjiang, sed la nove konstruita dutraka fervojlinio de Lanzhou al Xinjiang, longa je 1 622 km, plifaciligas la transportadon de Xinjiang al aliaj lokoj de la lando. Oni etendis la fervojojn okcidenten kaj en 1992 ĝi kunligiĝis kun tiu de la eks-Sovetio ĉe Alataŭ-pasejo. Dank' al tio, ekfunkciis la dua eŭrazia kontinenta ponto de Lianyungang, oriente en Ĉinio, ĝis Roterdamo, okcidente en Nederlando, kun la totala longo de 10 800 km.

Nun en Xinjiang funkcias ŝoseoj kun la totala longo de 28 611 km. 96.6% de la tieaj urbetoj kaj vilaĝoj havas ŝoseojn. Aŭtobusoj atingas 95% de la tieaj vilaĝoj. Asfaltitaj vojoj etendiĝas ne nur en Gobio kaj oazo, sed ankaŭ en la dezerto Taklimakan.

Dank' al aplikado de la Xi'an-Lanzhou-Urumqi-aj fotokabloj pli ol 3 000 km. longaj, satelito, cifera mikroondo kaj aliaj modernaj komunikiloj, en Xinjiang oni povas aŭdi la voĉon de Nov-Jorko, Londono, Parizo, Pekino kaj multaj aliaj en- kaj eksterlandaj urboj.

REFORMADO KAJ PORDOMALFERMO EN XINJIANG

La trafika evoluo faciligis la reformadon kaj pordomalfermon en Xinjiang. En 1980 fondiĝis la Tianshan-a Limigita Kompanio de Lan-teksaĵoj, la unua entrepreno en Xinjiang investita de Ĉinio kaj alia lando. Post la remalfermo de havenoj Korgas kaj Turgat en 1983, sinsekve ekfunkciis 12 havenoj ĉe la landlimo 5'400 km. longa. En 1992 Xinjiang sukcese okazigis la 1-an Landliman Komercean Intertraktadon en Urumqi. En la lastaj 3 jaroj la Xinjiang-a registaro sankciis pli ol 600 entreprenojn investitajn de Ĉinio kaj aliaj landoj kune. En la lastaj 10 jaroj, la tiea ekonomio pli kaj pli tendencis al merkato, stariĝis multaj entrepreno-grupoj kaj altaj scienc-teknikaj industrioj, pli kaj pli larĝe malfermiĝis la pordo. De januaro ĝis septembro de 1995 pli ol mil unuoj el 20 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj ekhavis ekonomiajn kaj teknikajn kunlaborajn rilatojn kun Xinjiang.

En Xinjiang ĉie videblas komercistoj kaj laboristoj el aliaj lokoj de la lando. Ankaŭ Xinjiang-anoj faras komercadon en- kaj eksterlande. Nun en Xinjiang vivas ĉ. 2 milionoj da alilokanoj kaj en aliaj lokoj de Ĉinio ĉie videblas Xinjiang-anoj. En Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj urboj estas Xinjiang-a vilaĝo, rosinoj kaj surstangaj rostitaj ŝafaĵoj vendiĝas ĉie en la lando, kaj eĉ en Rumanio, Bulgario kaj aliaj landoj de Balkanoj aktivis Xinjiang-aj komercistoj. Rapide kreskas en Xinjiang nacimalplimultaj entreprenistoj, sciencistoj, teknikistoj kaj laboristoj.

Iu fakulo analizis la supre menciitajn fenomenojn kaj diris al mi, ke tia homa, ekonomia kaj informa interŝanĝo estas grava historia disvolviĝo, ĉar ĉiu ajn nacio fariĝas senespera, se ĝi ne akceptas la avangardajn teknikojn de aliaj nacioj. Sed tio eblas nur dank' al la progreso de trafiko kaj telekomunikado. ■



Sur la paștejo țe la piedo de Tianshan-
montaro

Foto de **REN HAI**

En tekstilejo de Xinjiang

Foto de **REN HAI**





En foiro de Xinjiang, kie vendiĝas varoj ankaŭ el aliaj lokoj de Ĉinio

Foto de **REN HUA**

Ŝafbatalo

Foto de **SHEN QIAO**



Petrol-kampo sur la dezerto Taklimakan

Foto de **MA XINGYUAN**



Vortenigmo

Nia brazila leganto s-ro Jose Saraiva Matos sendis vortenigmon al ni. Plenigu la kvadratojn per literoj por formi el ili vorton. Enmetu samajn literojn en ĉiun kvadraton kun sama cifero. Post la korekta solvo de la subaj difinoj vi trovos ene de la nigraj kvadratoj literojn, kiuj formas frazon, per kiu la aŭtoro prezentas saluton al unu el la plej famaj ĉinaj esperantistoj forpasinta en februaro 1994.

(Solvo trovebla en tiu ĉi numero)

La Red.

1. Lernejo, kie oni instruas la kandidatojn al la pastreco		15	8	19	2	6	11	19	17
Ujo, por enteni violonon dum transportado	13		17	14	17	2	10	22	17
Klopodi kiel kandidato, por ricevi postenon, oficon ktp	20	6		12	19	12	6	1	19
Ĉiu el la turnigoj aŭ krurmovoĵoj en danco	12	6	2		17	21	6	18	17
Ĉiu el la etaj kapilaraj buloj en la reno	3	14	17	8		11	10	14	17
Daŭre konkuri	20	17	2	20	10		6	12	19
Kuko farita el pasto kun pistitaj migdaloj	8	6	11	4	19	21		2	17
Tiu, kiu havas komunan ideon, komunan celon kun alia		6	8	19	12	15	6		17
1. En la bilarda ludo, tuŝi per sia globo la du aliajn	20		11	6	8	16	17	14	19
Baal-Zebut	16	15		7	15	16	10	1	17
Solida substanco, ĉefparto de vegetaĵo C6 h 10 O5 (Plurale)	4	15	14		14	17	7	17	22
Ago de ilustranto	19	14	10	5		11	6	12	17
Kontraŭsepsa substanco, konsistanta el karbono, jodo kaj hidrogeno CHJ3	22	17	12	17	23		11	8	17
2. Veturilo uzata por transporti vunditojn, gravajn mal-sanulojn ks.		8	16	10	14	6		4	17
Larĝa spado, ĉefe uzita en dueloj	23		6	8	16	15	11	3	17
Tiu, kiu deĵoras, restas en deĵorejo	12	15		17	11	6	2	1	17
Havigi al iu krediton ĉe iu	20	11		12	19	1	19	3	19
Mezepoka eŭropa heroo kavaliro (Plurale)	21	6		6	12	19	2	17	22
Dento, situanta antaŭ la molaroj kaj malantaŭ la kaninoj	21	11		8	17	14	6	11	17
Domo, kie loĝas kaj instruas jezuitoj	22	15		10	19	1	15	22	17
Nomo de du apofizoj de la supra parto de humero	1	11		20	19	1	15	11	17



S-ro Huang Anren

NUNTEMPA BELARTO

STREBADO DE PENTRISTO HUANG ANREN

de PANG NAIYING

ANTAŬ pli ol 60 jaroj, en ĉemara vilaĝo de Yangjiang-gubernio de Guangdong-provinco, suda Ĉinio, estis knabo, kiu ofte sidadis sur plaĝo, pentris mevojn flugantajn super senlima maro aŭ velŝipojn reveturantajn en subiranta suno. La vasta maro inspiris al li amon por beleco kaj donis al li karakteron neflekseblan kaj optimisman.

Antaŭ 50 jaroj Ĉinio suferis de milito kaj malsato, do kiu volis doni atenton al arto? Sed li, diplomiginte el mezlernejo, vizitis artan lernejon. Liaj gepatroj koleriĝis pro lia elekto kaj ĉesis doni monon por lia lernado, sed li persiste lernadis pentrarton ofte en malsato. Kiel antaŭvidis liaj gepatroj, li neniel povis trovi laboron post diplomigo el la arta lernejo. Poste li armeaniĝis kaj en paŭzo inter bataloj skribis sloganojn aŭ faris propagandajn murpentraĵojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 li forlasis la armeon kaj okupis sin pri administrado en artista rondo, sed li neniam ĉesis pentri. Post sia emeritiĝo en 1984 li fariĝis profesia pentristo, tiam li aĝis jam 63 jarojn. Lia arta kreiveco erupciis kiel vulkano kaj li faris multe da pentraĵoj, kiujn oni rekompencis per premio. Liaj ĉinstilaj pentraĵoj, guaŝoj, skizoj kaj kaligrafiaĵoj estas ege sukcesaj. Lia nomo troveblas en libroj "Internacie Famaj Homoj" eldonitaj de Usono, Britio kaj Japanio.

"Mi amas la naturon," diris 75-jara Huang Anren. "Diversformaj montoj, kvietaj arbaroj, montaj fontoj kaj fluoj, la suno, la luno kaj la steloj... ĉiuj ĉi tiuj entenas en si belecon kaj estas fontoj por mia verkado." Por surpaperigi la naturan belecon li postlasis siajn piedsignojn sur diversaj lokoj de Ĉinio kaj en multaj landoj de Nord-Ameriko kaj Sud-Azio. Malgraŭ marmalsano li veturis kune kun fiŝistoj sur oceano; malgraŭ frosto, li vizitis la plej nordan lokon de Ĉinio. En 1989 li skizis en Kebeko de Kanado, ege frosta loko proksima al la Norda Poluso. Liaj kunvojaĝantoj staris ĉe li nur 15 minutojn kaj enaŭtiĝis pro la neeltenebla frosto. Tamen li persistis kaj finis la skizon. Li diris: "Mi devigas min kapti la ŝancon por surpaperigi belajn pejzaĝojn." En duonjara vojaĝo en Usono kaj Kanado li faris pli ol 100 skizojn.

Rigardante lian albumon de pentraĵoj, oni sentas

sin kvazaŭ en vizito de famaj vidindejoj. Sinjoro Huang pentris pejzaĝojn ĉefe por montri ilian spiriton. Li diris, ke fronte multajn pitoreskajn scenojn, li tamen devas elekti el ili pli pentrindan kun originala karaktero kaj distingiga aspekto. Antaŭ ol pentri arbon li longtempe pririgardis ĝin kaj rondiris ĉirkaŭ ĝi. Huang Anren lernis pentrarton unue eŭropan kaj poste ĉinstilan. Li pentris ĉinstilan pentraĵon ne nur per tradiciaj ĉinaj metodoj, sed ankaŭ per eŭropaj metodoj rilate dioramon, sekcadon, kolorigon kaj tridimensian efekton.

La birdoj kaj floroj en liaj pentraĵoj estas versimilaj kaj vivoplenaj. Paro da birdoj sidas sur balanciganta branĉo unu tuj apud la alia, tio estas lia pentraĵo "Ripozo en verda ombro", kiu bilde montras la agrablan kvietecon de la naturo, sed esence enkorpiĝas harmonion en la homa mondo. Antikvaj pentristoj donis atenton ĉefe al la ekstera beleco kaj delikateco, neglektante la naturecon de la pentraĵoj, sed sinjoro Huang liberigis sin de la rutino enkorpiĝante en pentraĵoj siajn pensojn pri la socio kaj vivo. Dank' al tio liaj pentraĵoj fariĝis signifaj kaj infektaj. Kiam li donacis sian pentraĵon pri Lijiang-pejzaĝo al amiko, la lasta tiel emociiĝis de admiro, ke li tuj improvizis poemon, ke Huang "pentru ebriigitan min sur la papero, loĝigu min en vilaĝo apud Lijiang-rivero".

Sinjoro Huang amas la vivon, la popolon, kaj senĉese strebas por pli bone prezenti ilin per tiu ĉi antikva ĉinstila pentrarto. Li prikantas la mastrojn de la nova vivo per sia plej profunda amo. En liaj verkoj la popolanoj flosigas lignon, transportas bananojn, elŝipigas fiŝojn, paŝtas anasojn... Rigardante tiujn pentraĵojn, oni kvazaŭ dronas en lirikaj poemoj pri la vivo.

Post sia emeritiĝo Huang Anren estas pli kaj pli okupita. Sur lia libroŝranko gluiĝas multaj paperslipoj, sur kiuj skribiĝas multaj aferoj farendaj por li, kiel doni lecionon en postlabora arta kurso, partopreni en diversaj seminarioj pri arto, inaŭguri ekspozicion de ies pentraĵoj... li estas helpema al novicoj kaj nur en profunda nokto li havas tempon por pentrado.

Sur la maro de arto li estas senlaca fiŝisto. La ŝipo jam estas plena, sed li daŭre disetendas la reton kaj pene veturigas sian ŝipon al pli malproksima maro!




"Sur Rivero"



"Sur Lijiang-rivero"



"Cervoj en Arbaro"



"Ĉe Monto"



En vilaĝo de rakontistoj

RAKONTI historiojn estas unu el la kutimoj de la antikva vilaĝo Wujiagou (Uĝjagoŭ), situanta en la densa arbaro norde de Wudang-monto en Hubei-provinco. Tie loĝas nur 200 familioj, kaj la vilaĝanoj en la aĝo de 4 ĝis pli ol 90 jaroj ĉiuj lertas en rakontado de historioj pri fantomoj, florfeinoj, vulpospiritoj kaj diabloj. Tiuj mirrakontoj, kiuj jam malaperis antaŭ longe el konceptoj de modernaj homoj, ankoraŭ cirkulas inter la vilaĝanoj de Wujiagou.

La plej eminenta el ili estas 67-jara Li Defu, kiu povas rakonti pli ol 400 historiojn. Li rakontas ĉie, ĉu en monto, kie li kolektas brullignon, ĉu sur kampo, kie li laboras. En la infaneco li ofte aŭskultis rakontojn ĉe siaj geavoj. Lia avo estis vaste konata kiel Reĝo de Rakontoj. De sia avo li heredis la talenton de rakontado de historioj. Dank' al lia eskerordinara memoro, la rakontoj, kiujn li aŭskultis en la infaneco, akompanas lin dum la vivo.

Lia nevo Li Zhenghai (Li Ĝenghaj) povas rakonti plejparton de liaj historioj. Antaŭe ili kune vivis. Rakonti kaj aŭskulti historiojn intimigis ilin. Poste, kvankam ili edziĝis kaj havis sian propran familion, tamen ili estis najbaroj. Ili eĉ kune vizitis foiron kaj survoje rakontis unu al la alia siajn

historiojn. Tiele ili ne sentis sin lacaj malgraŭ peza ŝarĝo surdorse.

“Kiam disiĝis la ĉielo de la tero, ne estis homoj en la mondo. La Ĉiela Dio sendis gefratojn al la mondo kaj ordonis al ili geedziĝi... Ili faris homojn el argilo...” Tiu mito pri farado de homoj cirkulas en Wujiagou de generacio al generacio. Ĝi tre similas al tiu en antikva libro. Kiu estas kreinto de la homaro? Tio atendas esploradon de fakuloj. “Fuma Valo” sendube estas legendo pri protogenezo. El ĝi la montanoj malklare sciigis, kiel la prauloj ekvivis en Wujiagou en profundo de primitiva arbaro.


Wudang-monto estas la sanktejo de taoismo. Famaj taoistoj en la monto fariĝis herooj de la legendoj: Zhang Sanfeng, la fondinto de Wudang-boksado, elkulturis nur unu sezamon sur kampoj. Kiam li frapis ĝin per bastono, sezamsemoj senĉese elŝprucis kiel fonto; taoistino Barbohava Avo estis lerta en kuracado. Antaŭ ol malsanulo eniris en ŝian ĉambron, ŝi jam enpakis drogherbojn. Preninte ilin, la malsanulo tuj resaniĝis.


La nihilismo de taoismo nerimarkite influas la Wujiagou-anojn. La malriĉeco ne irigas ilin el la blokita mondo. Ili preskaŭ ne zorgas pri la eventoj ekster la monto, nek scias komercadon. Hazarde ili iras eksteren nur por ŝanĝi lokajn produktaĵojn kontraŭ ĉiutagaj bezonaĵoj kaj revenas kun mirrakontoj kaj legendoj, kiuj donas al ili interesajn paroltemojn. Tiele ili vivas la vivon nekonatan kaj memkontentan. Hodiaŭ, kiam multaj ĉinaj kamparanoj liberiĝis el sub la kateno de komplaboroj, iris en urbojn kaj funkciigas entreprenojn, la Wujiagou-anoj ankoraŭ kutimas vivi sian malnovan vivon.

En la verkoj de Wujiagou-anoj malsata lupo estas kreditoro kaj lojala amiko; muso akuzas por homo pro maljustaĵo, lumbriko reciprokas favorojn; sovaĝaj bestoj kaj kortobirdoj povas transformi en virinojn, kiuj edziniĝas al homoj aŭ tenas sin malamike kontraŭ ili. La intrigo de ĉiuj rakontoj estas stranga kaj plena de humaneco.

“Pelta jako inkrustita per perlaĵ larmoj” temas pri amo inter homo kaj vulpospirito. La vulpo transformiĝis en belulinon, venis en la hejmon de

Vilaĝanino de Wujiagou kaj EPC-raportisto





Baldaŭ komenciĝos rakontado.

fraŭlo kaj ŝtele preparis manĝaĵon por li. Poste, ili geedziĝis kaj havis infanon. Foje, la edzo parole vundis sian edzinon. Ŝi do revulpiĝis kaj foriris por ĉiam... Tion rakontis maljunulo Ge Chaobao. Li estas analfabeto. Liaj gepatroj forpasis en lia infaneco. Li paŝtis bovojn por bienulo. 50 jarojn antaŭe, li ekhavis sian familion, sed lia novedzino estis forrabita. Poste, li edziĝis al vidvino, sed ne atendite, revenis ŝia antaŭa edzo, kiu armeaniĝis kaj silentis al ŝi multajn jarojn, ke oni opiniis, ke li mortis en batalo. Oni konjektis, ke la rakonto estis teksita de li mem, ĉar la vivo de la heroo kaj la lia similas unu al la alia. Nun la maljunulo havas denove sian feliĉan familion kaj lia filo klerigita scipovas rakonti multajn historiojn.

La primitiva koncepto "Ĉio havas spiriton" restas ne nur en rakontoj de Wujiagou-vilaĝo, sed ankaŭ en la penso de ĝiaj maljunuloj, kiuj plejparte kredas je diablo kaj fantomo. Iuj vilaĝanoj bonvenigas la sunon ĉiumatene, adiaŭas ĝin ĉiuvespere kaj festas la 19-an de novembro ĉiujare, la naskiĝtagon de la suno. La vilaĝanoj kultas fenikson (simbolon de feliĉo laŭ ĉinoj), precipe en la geedziĝaj tagoj oni brodas fenikson sur pordokurteno, litkovrilo, kapkuseno k.a.

Kvankam tre malmultaj maljunuloj de la vilaĝo vizitis lernejon, tamen ili ĉiuj estas talentaj en

rakontado. Laŭ ili, ankaŭ feoj havas sentojn, kiel ordinaruloj, kaj fenikso, reĝo de la birdoj, scipovas paroli kiel vilaĝanoj. Ili emas troigi, ekz., por hiperbole priskribi la absorbiĝon de taoisto en memkulturado, ili diris, ke li eĉ ne sentis, ke la radiko de herbo pikis lian piedon, nek rimarkis, ke birdo faris neston sur lia kapo, kovis la ovojn kaj forflugis kun la idoj. Ili parolas antifrazojn por fari komparon, ekz., por montri, ke iu havas malbonan aŭdkapablon, ili diris, ke li aŭdis tondradon kiel zumadon de kulo; por montri, ke iu havas malbonan vidkapablon, ili diris, ke li vidis bubalon kiel akridon. Ili nomas tiun, kiu lertas en rakontado, Korbo de Rakontoj kaj tiun, kiu bone kantas, Sako de Kantoj. Ili kreas la folkloran lingvon per humuro, honesto kaj alegorio propraj al kamparanoj.

Nun oni fondis en Wujiagou rakontistan asocion. En morta sezono de kamplaboroj la asocio okazigas rakonto-konkurson. Oni konstruas adoban podion kun vico da lignaj tabloj kovritaj per littukoj kaj litkovriloj kun desegnoj de fenikso, floro kaj folio. Ankaŭ loĝantoj de najbaraj kaj malproksimaj vilaĝoj venas ĉeesti la konkurson. En la lastaj jaroj Wujiagou akceptis ne nur najbarajn loĝantojn, sed ankaŭ fakulojn ĉinajn kaj alilandajn, kies grandan atenton altiris la libro "Kolekto de popolarakontoj de Wujiagou" kun 850 000 vortoj. Ili diris, ke Wujiagou, vilaĝo de popolarakontoj en Ĉinio, estas tipa ekzemplo kaj viva fosilio por koni la kulturen evoluon de Ĉinio kaj eĉ de la homaro. ■

Al ĉiuj amikoj de la mondkonata tabulludo Goo:

Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) invitas vin

Partoprenu la IV-an Internacian Korespondan Go-Turniron! Komence de la jaro 1996 EGLI organizas novan korespondan turniron. Ĉiuj esperantistaj go-ludantoj povas partopreni. Pri pli detalaj informoj turnu vin al: Matthias Reimann, Am Markt 20, D-99755 Ellrich, Germanujo; fakso/telefono: 49-(0)36332-70246

Somerumejo

Mogan-monto


Teksto kaj fotoj de **HAN HONG**

Se vi venos en Mogan-monton en varmega somero, vi tuj sentos agrablan kareson de malvarmeta vento kaj admiros ĝin.

La monto situas en la nordo de Zhejiang-provinco. Ĝi ne estas alta nek apika, sed frekventata pro la beleco de siaj bambuaroj, nuboj kaj fontoj. Kiel turisma loko, ĝi ĝuas famon per siaj verdeco, malvarmeco kaj kvieteco. Ĉie sur ĝi kreskas bambuaroj, susurantaj en freŝa aero. Matene, gazaj nuboj ŝvebas supren laŭ la deklivo; kaj kiam leviĝas la suno, nub-flokoj zonas la montotalion kaj kaprice ŝanĝadas siajn formojn.

Sur la monto estas multaj kaskadoj kaj fontoj. Promenante sur la monto, vi povas ĉiam aŭdi lirladon de akvo. Akvo el la profundo de bambuaroj kaj el rokfendoj formas longajn rojojn. Ili fluas malsupren, foje kaj foje falas sur rokojn kaj disĵetas abundon da akveroj. Se vi proksimiĝas al la falakvo, akveroj tuj ĉirkaŭvolvos vin per agrabla malvarmeco.

La monto estas ideala loko por somerumado.




Vojeto en bambuaro



Vilaĵoj sur Mogan-monto


Foto de **CHEN HUI**




Mogan-lago

Foto de CHEN HUI

Kaskado





Amikeco

de ZHANG SANGXIANG

Zhu Libo kaj sovaĝansero bredata de li

TIO okazis sur la stepo Horqin (Horĉin) de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

La gepatroj de knabo Zhu Libo (Ĝu Libo) trovis 9 sovaĝanseridojn en kampo kaj kun amo portis ilin al sia hejmo. Sub la zorgema flegado de la knabo kaj liaj gepatroj la sovaĝanseridoj kreskis rapide. Plenkreskinte, 8 el ili forflugis unu post alia. La restinta kun brunaj plumoj, nigra beko kaj blankaj flugiloj estis ege ŝatata, tamen Zhu Libo kaj liaj gepatroj portis ĝin al monto kaj liberigis ĝin, opiniante, ke ĝi jam plenkreskis kaj devas vivi memstare. Ekster ilia atendo, la sovaĝansero revenis hejmen pli frue ol ili.

Trovinte, ke la sovaĝansero ne volas forflugi, Zhu Libo daŭrigis la flegadon al ĝi. Iutage la ansero estis persekutata de hundo de najbaro kaj preskaŭ perdis la vivon, pro kio Zhu Libo montris malkontenton kontraŭ la najbaro. Ŝajne, la animita ansero sentis grandan amon de Zhu Libo kaj montris sin pli intima al li. Kiam Zhu Libo iris el la domo, la ansero ĉiam sekvis lin. Kiam la knabo vizitis lernejon, la ansero kvaŝaŭ sciis, ke estas malpermesite al

ĝi eniri en la klasĉambro, kaj silente staris sur la tegmento de la klasĉambro. Sed post kiam Zhu Libo finis la lernadon, ĝi tuj flugis al li.

Foje, kiam la knabo kune kun la ansero vizitis vendejon de najbara vilaĝo, kelkaj junuloj direktis sian pafilon al la ansero. Trovinte sin en granda danĝero, la ansero laŭte gakis. En tiu momento Zhu Libo tuj malhelpis ilian pafadon kaj forportis la anseron.

Iutage Zhu Libo luktis kun alia knabo kaj malvenkis. Tion vidis la ansero. La sonorilo eksonis por komenci lecionon, kaj la du knaboj stariĝis kaj hastis al la klasĉambro, kaj la rezulton de la lukto ili tute forgesis. Tamen la ansero tenis tion en sia memoro. Post la leciono la venkinta knabo eliris el la klasĉambro, kaj la ansero tuj flugis al li kaj forbekis lian ĉapelon por venĝi sian mastron.

Alifoje la ansero kure sekvis Zhu Libo, sed neniel povis atingi lin. Tio kolerigis ĝin. Ĝi do fluge bekis lian dorson. Pro la doloro li ekploris. Eble la ansero ekkonsciis sian kulpon kaj kun larĝe malfermitaj okuloj iris ĉirkaŭ la knabo. Fine, ĝi saltis sur liajn

krucitajn kruojn kaj per tremanta voĉo gakis por peti lian pardonon. Tiam lia patrino diris: "Mia kara, pro kio vi ankoraŭ ploras? La ansero konsolas vin!" Kaj nun la knabo ekridetis en honto. ■

Solvo por vortenigmo

1. SEMINARIO
2. VIOLONUJO
3. KANDIDATI
4. DANCOPAŜO
5. GLOMERULO
6. KONKURADI
7. MARCIPANO
8. SAMIDEANO
9. KARAMBOLI
10. BELZEBUTO
11. CELULOZOJ
12. ILUSTRADO
13. JODOFORMO
14. AMBULANCO
15. FLAMBERGO
16. DEĴORANTO
17. KREDITIGI
18. PALADINOJ
19. PREMOLARO
20. JEZUITEJO
21. TROKITERO

Xi'an, la komenco de la Silka Vojo

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de DA WEI

ANTAŬ la sunleviĝo la urbo Xi'an (Ŝji'an) estis vualita de maldensa nebulo. De la urbomuroj aŭdiĝis paŝbruoj de korpokercerantaj urbanoj kaj bicikla tintado. Kaj la vigla tago de la antikva urbo ŝajne komenciĝis tie.

La sceno vekis ĉe mi la imagon pri la antikva urbo Chang'an antaŭ 1 000 jaroj: Stratoj dense kruciĝas, butikoj staras unu apud alia, homfluoj bruas surstrate, en butikoj de silkaĵoj oni elektas diversajn varojn, en hoteloj nacimalplimultaj virinoj dancas gracie... Subite aŭdiĝas kame-la tintado. Per rigardo oni sekvas la karavanon, kiu direktas sin okcidenten sur la longan Silkan Vojon.

RUINO DE LA URBO

Mi informiĝis, ke nun ankorau videblas ruino de la urbomuro de Chang'an, la ĉefurbo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 25 p. K.). Chang'an funkciis kiel komenco de la Silka Vojo. Mi do decidis viziti la ruinon.

La urbo Chang'an situas sur


Longshouyuan-altebenaĵo, nord-okcidente de Xi'an, la ĉefurbo de la nuna Shaanxi-provinco. Tie sur la vasta kamparo ne vidiĝas bonordaj stratoj nek altaj domoj. Nia aŭto rampis sur malglata vojo, postlasante striojn da polvo.

"Ni jam venis en la ruinon de la urbo de la Okcidenta Han-dinastio. Ĝi kovras entute 35 kvadratajn kilometrojn. Ĉi tie estas malpermesate konstrui domojn," diris al mi arkeologo s-ro

Wang.

Post kelkaj minutoj la aŭto venis en Mazhai-vilaĝon. Antaŭ ni aperis du ekranmuroj, kiuj baris al mi la rigardon. Ĉe murangulo staras steleo kun surskribo "Ruino de Chang'an de Han-dinastio". Wang diris al mi, ke tio estas la suda muro de la urbo. Mi iris proksimen kaj vidis, ke la tero estas flava. Mi frapis ĝin per fingro kaj trovis, ke la muro estas fortika kiel ŝtono. Mi grimpis sur ĝin kaj vidis, ke la bone kon-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





Fresko de Tang-dinastia maŭzoleo montras, ke senditoj el Romio kaj aliaj landoj vizitas Tang-imperion.

Foto de **QIU ZIYU**



Ŝtonskulptitaj diplomatoj



Parto de Xi'an



servitaj suda kaj orienta muroj sin etendas malproksimen.

Wang diris al mi, ke en Han-dinastio en la urbo estis tri grandaj konstruaĵaroj, t.e., la palacoj Changle, Weiyang kaj Jianzhang (Ĝjanĝang). En la palaco Weiyang estis granda silkaĵ-farejo, destinita por produkti kaj tinkturi altklasajn silkaĵojn por la imperiestra familio.

BONE KONSTRUITA URBO

Post pluveto mi vizitis la Historian Muzeon de Shaanxi.

En la muzeo mi sentis min kvazaŭ en la historia galerio. La tieaj antikvaj bronzaĵoj, faritaj en la dinastioj Shang kaj Zhou (la 17-a jc - 256 a.K.), grandioza legio de terakotaj militistoj kaj ĉevaloj, sagoj kaj spadoj de Qin-dinastio (221-206 a.K.), tegoloj kaj ŝtonaj skulptaĵoj de Han-dinastio, trikoloraj fajencaĵoj, oraĵoj, arĝentaĵoj kaj maŭzoleaj freskoj de Tang-dinastio (618-907) reaperigis siatempan prosperon.

La eksponataj brilaj moneroj romanaj, persaj kaj japanaj, kaj elterigitaj medikamentoj bone konservitaj pli ol 1 000 jarojn montras la ekonomian interŝan-

ĝon inter Ĉinio kaj Okcidento siatempe kaj vekas rememoron pri la Silka Vojo en la antikveco.

Laboranto de la muzeo diris al mi, ke la urbo Chang'an konsistis el tri partoj, nome, imperiestra urbo, registara urbo kaj ekstera urbo, kun totala areo de 81.8 kvadrataj kilometroj, 2-oble pli granda ol tiu en Han-dinastio kaj 7-oble pli granda ol tiu en Ming-dinastio (1368-1644). La imperiestra urbo situis alte, kio simbolis, ke la imperiestra povo estas plej alta. En la registara urbo troviĝis ĉiuj registaraj oficejoj. En la ekstera urbo etendiĝis 11 stratoj nord-sudaj kaj 14 stratoj orient-okcidentaj, kiuj dividis la urbon en 108 kvartalojn, kie estis temploj, loĝdomoj de aristokratoj kaj ordinaraĵoj. Metiejoj kaj vendejoj troviĝis ĉefe en la orienta kaj okcidenta distriktoj. Zhuque (Ĝuĉjue), la plej longa strato en la urbo siatempe, estis 155 m larĝa, sed en la sama tempo la plej larĝa strato de Romo estis nur 12 m. En Chang'an vivis pli ol miliono da loĝantoj. Ĝi estis la urbo plej bone projektita en la ĉina historio kaj la plej granda urbo en la mondo siatempe. S-ro Li Wei, vicdirektoro de la muzeo, diris al mi, ke

tiam Chang'an estis staplejo de silkaĵoj el diversaj lokoj de Ĉinio. Tiam laboris en la urbo pli ol 700 teksistoj kaj brodistoj speciale por la imperiestraj familioanoj.


EKSTER KAIYUAN-PORDEGO

Chang'an havis 12 urbopordegojn. Kaiyuan, ekirpunkto de la Silka Vojo, estis unu el ili. Antaŭ pli ol 10 jarcentoj fama bonzo Xuanzang eliris el la urbo ĝuste tra ĝi kaj komencis sian longan vojaĝon al Hindio por pilgrimado. Multaj alilandaj diplomatoj, intelektuloj kaj komercistoj eniris Chang'an tra tiu ĉi pordego.

En iu hela tago mi vizitis ĝin. Tie estis grupo da gigantaj ŝtonaj skulptaĵoj: karavano el 13 kameleoj, 2 ĉevaloj kaj 6 homoj. Sur la bestoj estis grandaj pakaĵoj de silkaĵoj. Ĉe la fronto de la karavano staris okcidenta komercisto kun alta nazo kaj profundaj orbitoj.

Oni diris al mi, ke en Tang-dinastio la mejloŝtonoj markis, ke la distanco inter Kaiyuan-pordego kaj la oficejo de la ĝenerala gubernatoro de Anxi (en Xinjiang) estas ĉ. 5 000 km.

Ŝtonskulptita karavano ĉe la ruino de Kaiyuan-pordego



SUBTERA TREZOREJO DE SILKAĴOJ

Kvankam historiaj dokumentoj notas, ke en Chang'an de Tang-dinastio silkaĵoj estis amasigitaj kiel monteto. Tamen antaŭ 10 jaroj, kiam mi vizitis la muzeon, mi vidis, ke la eksponataj silkaj pecoj estas elfositaj el antikvaj tomboj en Xinjiang kaj aliaj lokoj. Mi vere bedaŭris tion. Ĉi-foje mi propraokule vidis belajn silkaĵojn eltrovitajn el la subtera palaco de la antikva pagodo de Famen-templo, 120 km for de la urbo Xi'an. Finfine mi trovis ateston pri la noto menciita supre.

Printempe de 1987, ĉinaj arkeologoj malkaŝis subteran palacon, konstruitan antaŭ 1 100 jaroj, kiam oni riparigis la antikvan pagodon, kaj trovis tie 4 fingrajn relikvojn de Ŝakjamunio kaj milojn da trezoroj de la imperiestra familio de Tang-dinastio. Ĉiuj tiuj trezoroj estas eksponataj en la muzeo de Famen-templo.

Sur tiea steleo legiĝas, ke la imperiestroj kaj iliaj edzinoj de Tang-dinastio donacis al la templo pli ol 700 kasajojn, jakojn, ĉapojn, jupojn kaj kusenojn. La kvalito kaj teksarto de tiuj silkaĵoj estis multe pli altaj ol tiuj de la silkaĵoj malkovritaj en Dunhuang, Gansu-provinco, kaj Turpan, Xinjiang. El tio vidiĝas, kiom grava estas la eltrovo.

Inter la silkaĵoj estas sateno, gazo, muslino, fulardo, brodaĵo, brokato k.a. Tie la brodaĵo tre interesis min. Ĝi estis farita el orumitaj silkaj fadenoj kun diametro de 0.1 mm, malpli dikaj ol la homa haro. Oni diris, ke hodiaŭ Ĉinio povas fari orumitajn fadenojn kun diametro de 0.3 mm.

En la ekspozicio mi vidis ankaŭ broditan jakon el orumitaj fadenoj, kasajon kun oraj desegnoj, jupon kaj kusenon, destinitajn por la ora bodisatvo proponita de la imperiestro Li Cui

(859-873 sur la trono) de Tang-dinastio. Kvankam ili estis fariĝintaj antaŭ pli ol 1 000 jaroj, tamen ili estis brilaj kiel novaj. La delikataj floroj kaj nuboj brokitaj sur ili montris la altan metiartan nivelon de Tang-dinastio.

ATESTO DE AMIKA INTERŜANĜO

Tang-dinastio estis potenca en ekonomiaj kaj militaj fortoj siatempe. Chang'an estis ne nur politika kaj ekonomia centro de la tuta lando, sed ankaŭ ĝia kultura centro. Tiam Tang-dinastio havis diplomatajn rilatojn kun pli ol 100 landoj kaj en Chang'an loĝis 50 miloj da alilandanoj. La sukcesan interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj atestis ankaŭ la grandioza maŭzoleo de imperiestro Li Zhi (650-684 sur la trono) kaj lia edzino Wu Zetian (690-705 sur la trono), unusola imperiestrino en la ĉina historio.

La maŭzoleo de Li Zhi kaj Wu Zetian situas sur la alta Wulingyuan. En Xi'an kuŝas pli ol 70 maŭzoleoj de imperiestroj de Han- kaj Tang-dinastioj, kiuj formis imponan spektaklon.

Rigardate de malproksime, la maŭzoleoj aspektas kiel virino kun longa hararo, kiu kuŝas surdorse kun la kapo norde kaj la piedoj sude, dum la du montpintoj, starantaj oriente kaj okcidente, aspektas kiel ŝiaj mamoj. Mi suriris la monton laŭ la ŝtonaj ŝtupoj, pensante, ke post nelonge mi povos rigardi ĉirkaŭen sur la supro de la monto. Tamen la supren-irado estis laciga, anheliga kaj ŝvitiga. Iomete ripozinte sub arbo, mi daŭrigis mian supren-grimpadon. Ĉe la vojo staris gigantaj ŝtonaj homoj, skulptitaj kolonoj kaj steleoj kaj krome tie staris ankaŭ 61 ŝtonaj skulptitaj diplomatoj. Nia ĉiĉerono diris al mi, ke senditoj el 61 landoj ĉeestis la funebran ceremonion por imperiestro Li Zhi. Wu Zetian ordonis artistojn fari ŝtonajn skulptaĵojn imite la sen-


ditajn diplomatojn. Komence tie estis 2 kromhaloj por loki la skulptitajn figurojn. Sed poste ne nur malaperis la haloj, sed ankaŭ la ŝtonaj skulptaĵoj estis eroziigitaj. Tial sur ili la gravuritaj epigrafoj fariĝis malklaraj, escepte tiujn sur tri ŝtonaj statuoj. Laŭ la epigrafoj la 3 senditoj venis el la landoj, kiuj situis en la hodiaŭaj Irano, Afganio kaj Xinjiang. Ili tenis amikajn rilatojn kun Tang-imperio siatempe.

GRANATO DE LINTONG

De la ekonomia interŝanĝo sur la Silka Vojo profitis ne nur la okcidentanoj, sed ankaŭ la orientanoj. Ĉinio enkondukis de Okcidento kotonon kaj ankaŭ bonrasajn ĉevalojn, felojn, lanaĵojn, glazuraĵojn kaj multspecajn plantojn, kiaj luzerno, vinbero, kukumo, juglando kaj granato, kiuj multe riĉigis la vivon de la ĉina popolo. Budhismo, islamismo, hinda filozofio, greka kaj roma pentrarto, muzikoj kaj dancoj enkondukitaj el Okcidento multe influis la ĉinan kulturon.

En Lintong-gubernio proksime de Xi'an, mi estis forte interesita de ruĝaj granatoj.

Lintong estas fama produkto de granatoj. Laŭ vojstreko mi iris al vilaĝo, kies granatĝardenoj etendiĝas ĝis dekoj da kilometroj. En la ĝardenoj ĉie vidiĝis ĝardenistoj rikoltantaj fruktojn. La branĉoj kliniĝis de granatoj. La plej granda granato pezis pli ol duonkilogramon. En la okuloj de la ĉinoj granato estas simbolo de riĉo, feliĉo kaj abundo da gefiloj. En Shaanxi-provinco, ĉe la nupto kaj naskiĝo de beboj oni donacas kapkusenon kun broditaj granatoj por gratulado. Vespere de la Aŭtunmeza Festo oni kutime manĝas freŝajn granatojn kaj kukojn, ĝuante la brilan lunon. Tiam la maljunuloj ofte rakontas al infanoj, kiel Zhang Qian, pioniro de la vojaĝantoj sur la Silka Vojo, enkondukis granatojn el Okcidento en Ĉinion. ■



Terakotaj kamelo kaj muzikistoj de Tang-dinastio



La imperiestra ĝardeno Xingqinggong jam malfermiĝis al turistoj.



Turoj sur urbomuro de Xi'an

En la loko fore de la sekulara mondo

— Vizito al la Budhisma Seminario de Jihua-monto

PURA LANDO

Kvieta antikva templo ĉirkaŭita de muroj tegitaj per verdaj rampaĵoj, fruktoportaj baŝooj antaŭ la fronta pordo de la templo — jen la Budhisma Seminario de Jihua-monto. Mi kvazaŭ eniris en senhoman lokon. De tempo al tempo mi renkontis junajn lernantajn monaĥojn, kiujn mi ne konis, sed ili ĉiuj diris al mi “Amitabon”, kio rompis la kvietecon kaj impresis la homojn sankte kaj solene.

Abato Kuanrong, vicdirektoro de la seminario, estas 26-jara junulo. Li portis sur si flavan kasajon, kaj lia paŝado montris senĝenecon kaj elegantecon. Li diris, ke hodiaŭ estas dimanĉo kaj la lernantoj ne havas lecionojn.

Li diris daŭre: “La Budhisma Seminario de Jihua-monto estis fondita en 1990. Oni prenis la templon Ganlu kiel sidejon de la seminario pro tio, ke ĝi estas malproksima de la homoplenaj vilaĝoj sub la monto kaj malproksima ankaŭ de la movoplena komerca strato Jihua, kie kvankam estas multaj temploj, tamen tro multaj ankaŭ incensantoj kaj turistoj, kiuj certe malkvietigos la lokojn...”

“Ĉu ĉio estas por memkulturo?”

“Jes. Monaĥiĝo estas malfacila por regantoj kaj altranguloj. Ni varbas junulojn, kiuj decidis sin dediĉi al budhismo, kaj akceptas ilin post ekzameno.”

Por ke la lernantoj estu patriotaj kaj fidelaj religianoj, kapablaj por administrado de monaĥejoj kaj por internacia recipokado, la seminario difinis al la lernantoj pli ol 20 kursojn, kies ĉefaj estas por budhismaj klasikaĵoj kaj parto por la antikva ĉina

lingvo, filozofio, verkado, ĉina medicino, kaligrafio kaj fremdaj lingvoj. La vivo de la lernantoj estas monotona kaj malluksa. Je la kvara matene ili devas reciti sutrojn. Post du horoj ili havas sportan ekzercon. Antaŭtagmeze ili havas 3 lecionojn kaj posttagmeze 2 lecionojn. Vespere ili denove recitas sutrojn kaj enlitiĝas je la 23-a. Post diplomitiĝo iuj laboros en diversaj temploj, aliaj restos en la seminario kiel instruistoj kaj triaj studos en eksterlando por sin kompletigi.

“Ĉu ili rajtas eksmonaĥiĝi, se ili ne povas elteni tian vivon?” “Certe ili povas eksmonaĥiĝi, se li ne havas destinan rilaton kun la Budho,” respondis abato Kuanrong.


SIDA MEDITADO, INICADO, MANĜADO

Enirinte en misteran halon por sida meditado, mi estis tuj altirita de giganta ideogramo, kiu en la sanskrita lingvo signifas “meditadon en kvieteco”. Tio estas ĉiutaga leciono de la lernantoj. Ili devas kviete sidi kun alte koncentrita atento.

La budhisma disciplino postulas de la membroj abstinon de ĉia malbonfaro kaj bonfaremon. La disciplino donis tre konkretajn difinojn por la konduto, parolo, pensado k.a. de monaĥoj, ekzemple sindeteno de mortigo, ŝtelo, amoro, bombasto kaj drinko.

Abato Kuanrong diris al mi, ke post trijara lernado la lernantoj bezonas inicon, alie ili ne povas esti kalkulataj kiel veraj monaĥoj. Inico havas originan ceremonion, dum kiu abato instruas al la inicatoj la darmon kaj disciplinon. La ceremonio daŭras

Novaj lernantoj ĵuras en la ceremonio de nova semestro



Post leciono





La Budhisma Seminario de Jiuhua-monto

ĉirkaŭ unu monaton. Sed la tempo ankoraŭ ne estas sufiĉa por multe da lernendaĵoj, tial la iniciatoj ofte studas tagnokte.

“Ĉu la iniciatoj povas deteni sin de dormemo dum longa ceremonio?”

“Eminentaj monaĥoj povas maldormi tutan jaron, kiam ili finis certatempan memkulturadon. Same kiel en ekzercado de *ĉigong-o*, ili povas tute spirite miksi sin en la universon, kaj tiam certe malaperas laco. Kiam ilia memkulturado atingis pli altan gradon, ke ili tute liberigis sian korpon kaj spiriton, ili povas fasti plurajn monatojn kaj scii la tempon de sia nirvano, kaj ne putriĝos ilia korpo...” Mi kredas, ke la abato ne trompis min. Multaj misteroj de la homa korpo atendas sciencan solvon.

Estis tempo por tagmanĝo, kaj lernanto venis sonigi la lignan fiŝon pendantan sub la tegmento. Fiŝo ne fermas la okulojn tagnokte, kaj budhanoj prenas ĝin kiel liturgian objekton por rimarkigi, ke la monaĥoj neniam forgesu memkulturi ĉu en irado ĉu en kuŝado aŭ sidado. “Ankaŭ manĝado povas esti memkulturo,” diris abato Kuanrong. “Budhanoj domaĝas vivaĵon kaj ne mortigas animalon nek manĝas viandon. Antaŭ manĝo la lernantoj devas reciti sutron, kies ĉefa enhavo estas, ke la manĝaĵo estas ne nur por la lernantoj, sed ankaŭ por la Budho, la bodisatvoj, vagantaj animoj, favorantoj kaj la gepatroj. Ĉe ĉiu preno de la unuaj tri buŝoj da manĝaĵo la lernantoj devas murmuri sutrojn. Mi vidis, ke ĉe la manĝo ili havis 4 pladojn, unu bovlon da supo kaj unu pomon. Ili manĝis malrapide, tute kviete. Ili observos vegetarismon dum la tuta vivo, kion mi opinias malfacila por mi. Kaj abato Kuanrong diris: “Kiam oni komprenos la veron, li memkonscie praktikos vegetarismon. Mi praktikis vegetarismon jam 9 jarojn, kaj mi sentas min sana kaj vigla, kaj mi neniam suferis de malvarmumo.”

LA KIALOJ DE MONAĤIĜO

Kial tiuj lernantoj volonte faris sin monaĥoj, kiam la aliaj kunuloj sin distradas per diversaj modernaj amuzaĵoj?

“La mondo estas bela, la mondo estas embarasa,” tiel klarigis lernanto Kairu per la frazoj el popmuziko. “Mi laciĝis,” diris alia. Jes, konkuro pri ekzisto

estas tro intensa, sed ilia monaĥiĝo ne indikas, ke ili ne havas la forton por konkuri. Iuj el ili estis studentoj de ekonomiko aŭ komputero, kaj ili motivis sian monaĥiĝon per diversaj kialoj. Gangxiao, elstara studento de iu medicina universitato, diris: “Mi feliĉe vivis kiel kuko en butero, la gepatroj kaj instruistoj decidis ĉion por mi, por ke mi superu ĉiujn aliajn. Mi perdis la puran koron, kaj nun mi volas retrovi la veran memon, purigi la koron kaj havi modestan sanan vivon.” “Ne ĉiuj monaĥiĝis pro sia malsukceso,” diris tria, “mi ŝatas la kvietecon kaj elegantecon de la temploj, kie oni povas ĝui agrablan harmoniecon. Budhismo ne estas superstiĉo, ĝi, kiel alta edukado trans la sciencoj kaj filozofio, redonas al la homoj kvietecon kaj naturan memon.” Mi faris demandon al lernanto Xin Yuan, kaj tiu junulo kun nigrakadraj okulvitroj respondis ĝentile: “Pli kaj pli dekadencas la spirito de la modernaj homoj, sed la homaro kreis la materian civilizacion ne por tio. Mi volas trovi fundan solvon.” Li iros lerni en Birmo por 6 jaroj. Li diris, ke monaĥiĝo estas lia destinita volo.

Tre diversaj estas la kialoj de ilia monaĥiĝo, sed ili ĉiuj devas esti sufiĉe kuraĝaj por fronti la straban rigardon de la socio kaj malaprobon de la parencoj. Malgraŭ tio ili ne fariĝis apatiaj nek inertaj, ilia monaĥiĝo ja celas savon de la mondo. En infaneco Duan Chen faris el knedpastro bonzon sidantan kun krucitaj kruroj. Liaj gepatroj ridis kaj ŝercis kun li: “Ĉu ni sendu vin en templon, ke vi estu bonzo?” Sed post 20 jaroj, kiam ilia filo vere decidis monaĥiĝi, ili ploregis. Duan Chen diris, ke budhanoj plej taksas respekton al la gepatroj, kaj rigardas ĉiujn gepatrojn la siaj. Duan Chen diris ankaŭ, ke helpi ilin elturniĝi el la amaro estas vera respekto al ili.

Remaĉante la dirojn de lernantoj, mi pensis, ke ne estos dece, ke ĉiuj monaĥiĝos, ĉar evoluo de la socio estas nedisigebla de la kreo de la materia civilizacio. Tamen la mondo fariĝos pli bela, se la homoj kondutos honeste, ne ĉasos profiton nek famon, ĉiam strebos al pli alta celo kaj ĉiam estos pretaj doni helpon.

INFANA KORO

La lernantoj neniam plendis, malgraŭ ke ili devis fari lacigan pilgrimadon kun genuiĝo en ĉiu tria paŝo dum 5 horoj aŭ ekzercadon kun nuda korpo en neĝo. “La vorto malfacilo ne troviĝas en budhaj sutroj, nur sentimaj homoj povas fariĝi budhanoj”, la junaj lernantoj kuraĝigis sin per tiu sentenco.

“Ili lernas tre serioze. Se leciondonado de instruistoj ne estas interesa, ili senkaŝe montras malkontenton,” tiel rakontis budhismologia instruisto pri siaj instruatoj. “Antaŭ ol veni en la templon ili estis petolaj infanoj, sed ĉi tie ili devas obei la rigorajn disciplinojn. Malgraŭ tio post lecionoj ili havas tre diversajn amuziĝojn. Ili prezentas humuran dialogon pri sia vivo, ludas muzikilojn, tablete-

nison, aŭ fotas sin dum distrado kun ŝafido aŭ bovido.”

Kiam mi vidis Wei Li, li estis enmetanta enleterkeston du leterojn adresitajn al liaj parencoj. Li estis sendita de la budhanaj gepatroj en la templon, kiam li estis 12-jara. Antaŭ ol veni lerni en la seminario, li jam estis la prezidanta bonzo de iu templo. Sed malgraŭ tio li ofte montris infanan koron.

“Wei Li, kion vi ŝatas fari post lecionoj?” Li gratis al si la senharan kapon kaj respondis post longa pensado: “Mi ŝatas distriĝon... kaj ankaŭ kaligrafion. Sed se aliaj vokas min al distriĝo, mi tuj konsentas.” “Vi certe estis petola, kiam vi lernis en elementa lernejo.” Li ekridis: “Mi ne petolaĉis, sed nur dormadis. Foje mi kaptis majskarabon, faris el kaŭĉuko kaj fera drato ĉareton kaj jugis la majskarabon al la ĉareto, por ke ĝi tiru ĝin...”

“Li estis la plej petola en la kurso.” Tion diris Chuan Wu, afabla pli aĝa frato. Kiam li aŭdis tusaĉon de Wei Li, li tuj donacis al li medikamenton. Chuan Wu estis febranta kaj ĵus revenis de hospitalo post envejna pogutigado. Li devis resti en la hospitalo, sed li ne volis kaj revenis, ĉar en la sekvanta tago li havos lecionojn.

Preterpasis Xin Yuan. Rigardante al la foriranta Xin Yuan, Wei Li diris kun laŭdo: “Li estas tiel saĝa, ke li povas rememori ĉion diritan de instruisto, kvankam li ne faris notojn dum la lecionoj. Krome admirinda estas lia kaligrafio, kaj li skribis multajn distikojn por la pordoj de la templo. Li estas redaktoro de la seminaria revuo ‘Amrta’ (simila al nektaro).” Je mencio pri la ĉefinstruisto abato Heng Guo, Wei Li montris grandan admiron: “La instruisto estas nur 28-jara, diplomito de la seminario. Li estas tre forta en luktarto ĉu per glavo ĉu per bastono!” “Ĉu li estas severa al vi?” “Terure severa!” respondis la juna bonzo. “Kelkfoje mi ne povis akurate ellitiĝi je la kvar, li riproĉis min pro mia maldiligenteco. Kiam mi hastis al la halo kun kalkanoj ekster la ŝuoj, li ĵetis al mi rigardon.” Wei Li diris kun nenia kaŝo. Menciante la nunecon, li perdis la naivecon sur la vizaĝo kaj diris serioze, ke jam forpasis la infaneco, ke li sentas mankon de scioj kaj volas diligente lerni. Li diris al mi, ke li estas ekzercanta sin per *ĉigong*-o nomata *shentong*. Li volas studi estontece konfuceanisman, taoisman kaj kristanisman, por sin kompletigi kaj pli efike propagandi budhismon...

“Ĉu vi sopiras al la gepatroj?” mi demandis. “Ne estas vero, se mi diras, ke mi ne sopiras,” respondis Chuan Wu. “Dum vintraj ferioj mi revenos por viziti mian instruanton,” diris Wei Li. “Mi ne revenos hejmen,” diris Chuan Wu, rigardante al la malproksimaj montoj. “Jes, vi venis ŝtele,” komprene kaj ŝerce diris Wei Li.

Monahigo de Chuan Wu estis enigmo, kaj li ne malsekretigis al mi la respondon. ■

MULTNACIA ĈINIO

Nyingchi sur la monda tegmento

de WEI GUOXIONG

AŬGUSTO estas la plej bela tempo por la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Veturante al Nyingchi, ni estis ravitaj de pitoreskaj pejzaĝoj sub la lazura ĉielo, kiaj verdaj montoj kun pintoj neĝkovritaj, ŝvebantaj nuboj inter montvaloj kaj la orienten fluanta Niyang, branĉo de la rivero Yarlung Zangbo.

“Por plene koni Tibeton nepre necesas viziti Nyingchi,” diris al ni plurfoje tibetanoj en Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto. Tio aludas ne nur la ĉarmajn pejzaĝojn, sed ankaŭ la riĉfontojn kaj konstruadon en la loko.

Ni veturis orienten laŭ la rivero Lhasa. Transveturinte la monton Mila, ni atingis Nyingchi. Sur la altaj montoj ambaŭflanke de la ŝoseo kreskis densaj arbaroj. Nyingchi, 3 100 m super la marnivelo, situas sude de la montaro Nyanqentanglha, norde de la orienta parto de Himalajo, okcidente de la montaro Hengduan kaj oriente de la montaro Gangdise. La jara averaĝa temperaturo estas 7-16°C kaj abundas pluvo. Influate de la varmfluo el la Hindia Oceano, la klimato estas tre ŝanĝigema.

Nyingchi estas loko riĉe naturdotita. La riveroj kaj la lagoj estas naturaj fiŝejoj kaj la arbaroj — ĝardenoj de sovaĝaj bestoj. Kaj la kelkcent riveroj kaj kelkdek lagoj de Nyingchi havas akvoenergian fonton de 82.25 milionoj da kilovattoj.

La verdaj montoj, klaraj riveroj, lazura ĉielo kaj blankaj nuboj ĉarmigas la lokon. En ĝi troviĝas 4 rezervejoj ŝtat- kaj provinc-nivelaj. Alilandaj turis-

toj opiniis, ke la lago Basongcuo povas rivali kun la Ĝeneva Lago. Kaj plie, la Ravino de Yarlung Zangbo, la plej granda en la mondo, estas ideala loko por montogrimpado, ekspediciado kaj drivado.

Nyingchi allogas pli kaj pli da alilandaj turistoj. Sur la ŝoseo inter Nyingchi kaj Lhasa alilandaj turistoj biciklante ĝuas belajn vidindaĵojn. Ni venis al la urbeto Bayi 3 000 m super la marnivelo, ĉe la bordo de la rivero Niyang. Antaŭ 1965 ĝi estis dezerta kaj nun ĝi estas la centro de politiko, ekonomio, kulturo kaj trafiko de Nyingchi-regiono.

Vickomisaro en Nyingchi konigis al ni, ke surbaze de riĉfontoj, kun entreprenoj urbataj kaj vilaĝaj kiel la ĉefaj, agrokulturo kiel la fundamento kaj brutobredado kiel la apogilo, oni energie reordigas industrian strukturon kaj penas, por ke la tradicia agrikulturo ŝanĝiĝu en tiun altproduktan, altefikan kaj bonkvalitan. Dank' al tio, la enspezo de kamparanoj kaj paŝtistoj pliiĝis, la totala grena produktokvanto kreskis de pli ol 40 000 tunoj en la pasintaj jaroj al pli ol 60 000 tunoj nun kaj la jara pokapa enspezo jam superis 1 100 juanojn.

Antaŭ ol viziti la Tibetanan Aŭtonoman Regionon, ni jam sciis, ke antaŭ la 60-aj jaroj la regiono Nyingchi havis neniun entreprenon. Sed nun ĝi jam fariĝis la dua grava industria bazo en la Tibeta Aŭtonoma Regiono. En Nyingchi, krom pli frue konstruitaj industrioj elektra kaj tekstila, jam aperis nun industrioj de ligna prilaboro, aŭta transporto, maŝina riparo, muntado, konstruaj materialoj kaj manĝa prilaboro.

Promenante sur stratoj de Bayi, ni vidis multe da novaj domoj. En la lastaj 10 jaroj la urbo finis 179 projektojn kun totala investo de 120 milionoj da juanoj kaj konstruis akvoprovizan fabrikan kun taga liverkvanto de 15 000 tunoj, stratojn kaj drenubojn.

Kia do estas la vivo de la montanoj loĝantaj fore de la urbo? Nia aŭto veturis 80 kilometrojn suden de la urbo kaj alvenis al la Nanyi-a Loba-nacia Subdistrikto de Minling-gubernio, sudoriente de Nyingchi. 80% de la loĝantoj de la subdistrikto estas loba-oj.

La subdistriktestro konigis al ni, ke antaŭ la 50-aj jaroj la loba-oj vivis en la lasta periodo de la primitiva socio. Ili loĝis sur montoj, havis ege malfacilan trafikon kaj ne kontaktiĝis kun la ekstera mondo. Ili kultivis per primitivaj metodoj kaj la naturaj kondiĉoj ludis gravan rolon en la kultivado. Pro tio la popolanoj vivis mizeran vivon. Sed nun la loba-oj kultivas per modernaj sciencoj kaj teknikoj kaj ilia vivo pliboniĝas tago post tago. Pasintecce ili vivtenis sin ĉefe per kultivado, ĉasado kaj kolektado de drogherboj, sed nun ili ankaŭ funkciigas entreprenojn.

La subdistriktestro invitis nin viziti Nanyi-vilaĝon. Ni do venis al vico da novaj loĝdomoj kun tegola tegmento. La 12 loĝdomoj estis konstruitaj en

1990 per 200 000 juanoj investitaj de la ŝtato. La mastro Dabin, pli-ol-40-jara kaj mezastatura, estis kapabla kaj modesta. La edzino de Dabin regalis nin per sekala vino. Dabin diris, ke lia familio konsistas el 4 membroj kaj pasintjare ili enspezis pli ol 2 000 juanojn en flankokupo. En lia tenejo ni vidis multe da peklita viando kaj apraj feloj. Sed vekis ĉe ni grandan intereson la orde pendantaj apraj mandibloj. Li konigis al ni, ke ankoraŭ cirkulas la moro, ke la loba-oj egale dividas ĉasajon kaj donas la kapon kaj felon de la ĉasita besto al la unua trafinto. La 17 apraj mandibloj en la tenejo de Dabin, kiujn li gajnis en la lastaj 3 jaroj, montras, ke li estas sperta ĉasisto.

Ni demandis la subdistriktestron, ĉu Dabin estas unu el la plej riĉaj paŝtistoj. Li diris, ke inter la vilaĝanoj Dabin vivas meze bonan vivon. En Nanyi-vilaĝo riĉaj familioj bredas pli ol 20 brutojn kaj ĉiu el ili enspezas pli ol 10 mil juanojn jare.

Forlasinte Nyingchi-regionon, ni retrorigardis ĝiajn belajn vilaĝojn tra fenestro de la aŭto kaj bondeziris al la popolanoj de la regiono pli feliĉan vivon en la multnacia Ĉinio. ■

Nova loĝdomo en la urbeto Bayi



Tibetano Mima (dekstre) kaj lia aŭto



Pri advokateco de Ĉinio

de MIAO JIAN

EN la 7-a kaj 8-a de oktobro 1995 okazis la 7-a landskala advokato-kvalifika ekzameno en Ĉinio. La 1-a ekzameno okazis en 1986. Ĉi-foje estis 116 000 ekzamenatoj, inkl. de pli ol cent el la Tibeta Aŭtonoma Regiono. La ekzameno estis malfacila, tamen la nombro de enskribiĝintoj kreskis jaro post jaro. Tio montras, ke kun progreso de la socia civilizacio kaj kresko de la bezono de la ekonomia disvolviĝo, advokateco jam fariĝis ŝatata profesio en Ĉinio.

En 1979 en Ĉinio estis nur dekoj da advokatoj, sed nun estas 90 000. La figuroj de elokventaj advokatoj, viditaj antaŭe en alilandaj filmoj, jam eniris en la vivon de ĉinoj en la 90-aj jaroj.

LEĜO BEZONAS ADVOKATOJN

Estas nature, ke oni sin turnas al advokato, ke ĉi tiu defendu liajn interesojn. Sed tio estis freŝa antaŭ kelkaj jaroj en iuj lokoj de Ĉinio. Oni rakontis, ke tiam iu advokato veturis al Henan-provinco por proceso, lokanoj ligis lin al arbo per ŝnuro, opiniante, ke li priparolas por aĉulo. Tia fenomeno okazis malofte, tamen ĝi montris, ke iuj malmulte konas leĝon. Dank' al disvolviĝo kaj propagando de advokateco en la lastaj jaroj, la stato ŝanĝiĝis. Julie de 1995 ĝuste en Henan-provinco la Popola Juĝejo de Xixia(Ŝjiŝja)-gubernio traktis proceson de kamparanoj kontraŭ la Stacio de Disvastigo de Agrikulturaj Teknikoj de la gubernio, ke ĝi perfidis la

Advokato Li Qiang (maldekstre) kaj lia kliento



subskribitan kontrakton. Por defendi sian rajton, la kamparanoj sin turnis al advokato kaj fine gajnis la proceson.

Nun pli kaj pli multaj ekonomiaj departementoj kaj organizoj engaĝis advokaton kiel sian leĝan konsilanton. En civilaj procesoj advokatoj ankaŭ faris grandan penadon por defendi la leĝajn interesojn de siaj klientoj.

Kvankam advokatoj ne rekte partoprenas en la ekonomia konstruado, ili havas rilaton kun rapideco de la ekonomia disvolviĝo. Oni rimarkis, ke en grandaj urboj kaj ĉemaraj regionoj advokatoj estas tre viglaj, tie oni bezonas grandan nombron da advokatoj, dum en landlimaj regionoj videble advokatoj ne estas tiel gravaj.

La ĉina ekonomia konstruado iom post iom suriras ĝustan vojon, ankaŭ konstruado de leĝa sistemo perfektigas tago post tago kaj koncepto pri leĝo ĉiam pli profundigas en la koro de la popolo. La moderna konstruado de socialismo urĝe bezonas uzi leĝon por administri la socian ekonomion, ankaŭ la popolo deziras defendi siajn interesojn per ĝi. La disvolviĝo de leĝo estas nerezistebla. Advokateco estas pli kaj pli atentata, ankaŭ tio estas nepra tendenco.

S-ro Tian Wenchang, kiu instruis en la Ĉina Politika kaj Jura Universitato plurajn jarojn, opiniis, ke vidinte la brilan perspektivon de la advokateco, oni aktive partoprenis en la landskala advokato-kvalifika ekzameno. Kaj tiel la trupo de ĉinaj advokatoj ĉiam pli grandiĝas.

KIOM DA ADVOKATOJ ĈINIO BEZONAS?

Antaŭ la fino de la kuranta jarcento Ĉinio bezonos 300 000 advokatojn por kontentigi la socian bezonon. Tamen tiu kvanto estas preskaŭ neatingebla. Tial la ĉina registaro difinis la celon, ke estu 150 000 advokatoj antaŭ la fino de la kuranta jarcento.

Por adaptiĝi al la postulo de la socia evoluo, la landskala advokato-kvalifika ekzameno naskiĝis en 1986. En la komenco nur laborantoj okupitaj pri juro rajtis enskribiĝi por la ekzameno. Poste ankaŭ diplomitoj el aliaj fakoj kaj eĉ laborantoj en la publik-sekurecaj, prokuroraj kaj justicaj instancoj

povas enskribiĝi por la ekzameno. Inter la ekzamenoj, krom registaraj oficistoj kaj laborantoj de la publik-sekurecaj, prokuroraj kaj justicaj instancoj, estas ankaŭ oficistoj de kompanioj, partiaj kaj registaraj kadroj, magistroj kaj doktoroj lernantaj en universitato kaj eĉ maljunaj oficistoj.

F-ino Qian (Ĉjan) diplomitiĝis el la jura fakultato de universitato kaj laboras en iu institucio de Pekino kiel sekretariino. Ŝi enskribiĝis por la ekzameno por fariĝi advokato, opiniante, ke ŝi devas servi per siaj lernitaj scioj.

S-ro Wang, okupita pri materiala administrado, tre enviis advokatecon. Por efektiviĝi sian deziron fariĝi advokato, li dufoje enskribiĝis por la ekzameno.

La landskala advokato-kvalifika ekzameno ne nur mobilizis la talentulojn, sed ankaŭ riĉigis la rezervon de advokatoj kaj akcelis la disvolviĝon de la advokata trupo.

NOVAJ ADVOKATEJOJ

Samkiel la vorto "advokato", "advokatejo" estas io freŝa, kiu eniris en la vivon de la ĉina popolo nur en la lastaj jaroj kaj estas vaste parolata.

Antaŭ dekelkaj jaroj en Ĉinio funkciis leĝo-konsultejo. En 1983 la urbo Shenzhen la unua starigis advokatejon kaj anstataŭigis la leĝo-konsultejon per ĝi. En 1984 la ĉina justico proponis anstataŭigi la nomon leĝo-konsultejo per advokatejo. Advokatoj ne plu laboras kiel postkulisaj konsilantoj, sed komencis trakti proceson kaj montri sian profesion trajton -- primajstradon de leĝo kaj elokventecon.

Nun funkcias pli ol 7 000 advokatejoj en Ĉinio. Ili plejparte estas en grandaj kaj mezgrandaj urboj kaj ĉemaraj regionoj. En Pekino funkcias 200 advokatejoj kaj aliaj 200 atendas registriĝon. En Ŝanhajo la pli ol 200 advokatejoj estas tre okupitaj. En landlimaj kaj malproksimaj regionoj estas malmultaj fakuloj kaj tiuflankaj instancoj.

La advokatejoj estas starigitaj de la registaro, kolektivo aŭ individuoj. En ili laboras profesiaj advokatoj kaj ankaŭ kumulantoj, kiuj konsistigas pli ol 1/3 de la totala nombro de advokatoj. Ili donas konsultiĝon al iuj ŝtataj organoj, entreprenoj, administracioj, societoj kaj individuoj, skribas por ili akuzon kaj laboras kiel ilia leĝo-konsultiĝanto.

La supre menciitaj f-ino Qian kaj s-ro Wang trapasis la advokatiĝan ekzamenon kaj ricevis atestilon. Ili povas labori kiel leĝo-konsilantoj en la libertempo aŭ labori kiel profesiaj advokatoj en iuj advokatejoj. Nun pli kaj pli multaj homoj kiel ili trapasis la ekzamenon kaj akiris kvalifikon de advokato, kaj multiĝis ankaŭ advokatejoj.

PROBLEMOJ ALFRONTATAJ DE ADVOKATECO

La ĉina advokateco estas en la primara etapo de disvolviĝo kaj aperis nemalmultaj problemoj solvendaj. S-ro Tian Wenchang, respondeculo de Jingdu-advokatejo, tre maltrankviliĝas, ke la advokateco kiel sankta profesio ofte estis miskomprenata pro nemoraleco de iuj advokatoj. Iuj nekvalifikitaj pseŭdoadvokatoj makulis la honoron de advokatoj per siaj fifaroj, profitante la naivecon de siaj klientoj. Ankaŭ novaj advokatejoj havas problemojn en sia disvolviĝo. Iuj advokatejoj tute ne povas daŭrigi sian laboron, ĉar ilia profesia kvalito estas malalta kaj malfacile por ili serĉi klientojn. Inter advokatejoj iras nenormalaj konkuroj, kaj malmultaj nemoralaj advokatoj gajnas al si klientojn per nehonestaĵoj.

Altigi la kvaliton de profesiaj advokatoj kaj akceli la prosperiĝon de la advokateco estas peniga laboro. Por plenumi tiun laboron, necesas ne nur penado de la advokatoj mem, sed ankaŭ superrigardo de la tuta socio.

La disvolviĝo de la advokateco ne nur akcelos la disvolviĝon de la socia ekonomio kaj civilizacio, sed ankaŭ antaŭenpuŝos la disvolviĝon kaj perfektigon de la konstruado de la socialisma leĝa sistemo. Malfaciloj estas multaj. La tasko disvolvi la ĉinan advokatecon estas peza. La advokata administracio konfesis, ke Ĉinio bezonas grandan nombron da advokatoj kaj, pli grave, advokatojn kun deontologio. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1996

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1700,00	1300,00	3000,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
TARIFO A: Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
TARIFO B: Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
TARIFO C: Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
Rim. Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.				

Konfuceanismo en la vivo de ordinaraj ĉinoj

de HOU JUELIANG

Mi volas sciigi pri tio, kiom grade konfuceanismo regas agadon ĉiutage sur unuopa ĉino en urbo kaj en kamparo.

KATOO IVAO (Japanio)

ANTAŬ 50 jaroj mi, knabo, vivis en montovilaĝo, en kies privata lernejo instruisto donis lecionojn ekskluzive pri klasikaj libroj de konfuceanismo. En la klasĉambro pendis portreto de Konfuceo (551-479 a.K.). Novaj lernantoj devis adorkliniĝi al la portreto por montri respekton al Konfuceo.

Mi lernis en novtipa elementa lernejo kaj ne bezonis adorkliniĝi al la portreto de Konfuceo. Tamen, ĉiu-aŭtune okazis "Kunveno pri Konfuceo" ĉe la datreveno de lia naskiĝo. Lernantoj kun siaj gepatroj kaj instruistoj kolektiĝis en lernejo, memore al Konfuceo, la talenta reprezentanto de la ĉina kultu-

ro, kaj kune tagmanĝis. En la kunveno instruistoj konigis la vivon kaj ideon de Konfuceo. Ĝuste de tiam mi havis ian scion pri li.

Konfuceo vivis en la feŭda socio antaŭ 2 500 jaroj. En la infaneco li perdis sian patron, poste forpasis ankaŭ lia patrino. Juna Konfuceo sole vivis en mizero. Li havis altan idealon kaj mem studis. Li establis lernejon kaj fariĝis la unua edukisto en la ĉina historio. Li havis 3 000 lernantojn, inter kiuj 72 fariĝis eminentaj intelektuloj.

Li instruis kaj samtempe editoris kulturajn restaĵojn de antaŭuloj. Li multe kontribuis al konservado



de kulturaj klasikaĵoj de Ĉinio. Dank' al lia editorado, nun legeblas la plej fruaj poemoj, historiaj libroj kaj filozofiaj verkoj de nia lando.

Post la morto de Konfuceo, liaj disĉiploj kolektis liajn parolojn kaj kompilis la libron — "Analektoj de Konfuceo", kiu estas lia ideologia heredaĵo kaj trezorejo de konfuceanismo. En la pasintaj pli ol 2 000 jaroj, ĉinaj intelektuloj studis la libron konstante kaj akiris el ĝi multe da scioj. Ankaŭ ordinariaj ĉinoj estas multe influataj de tiu libro.

Foje Konfuceo preterpasis Taishan-monton kaj aŭdis ploron de maljunulino. Li sendis sian disĉiplon demandi pri la kialo. La maljunulino respondis: "Antaŭ kelkaj jaroj mia edzo estis mortigita de tigro en la monto. Antaŭ nelonge ankaŭ mia filo mortigita de tigro." La disĉiplo demandis: "Kial do vi ne transloĝiĝis al alia loko?" La maljunulino diris: "En monto ni povas eskapi la imposton de registaro." Konfuceo komprenis kaj veis: "Severa politiko timigas pli ol feroca tigro." Kontraŭ la kruela ekspluatado kaj subpremado fare de feŭdaj regantoj, Konfuceo proponis per "virta politiko" anstataŭigi la "severan politikon" superimpostantan kaj la "kruelan politikon" senbride mortigantan homojn. Konfuceo konsilis al la regantoj apliki "virtan politikon", kiu baziĝas sur humaneco. La ĉefa ideologio de Konfuceo estas "humaneco". Li insistis, ke "estu humana kaj amu la aliajn", "amu la tutan popolon", "helpu la amason". Li proponis, ke unue oni riĉigu la popolon. Kiam ilin ne plu ĉagrenos la problemoj de manĝaĵoj kaj vestoj, tiam eduku ilin, por ke ili estu civilizitaj. La de li proponitaj "virta politiko" kaj humaneco estis tre ŝatataj de la popolanoj, kiuj sentis ke Konfuceo proparolis por ili. La popolanoj ofte riproĉis la ekspluatantojn kaj subpremantojn per vortoj de Konfuceo. En la infaneco mi ofte aŭdis, ke kamparanoj insultis la bienulojn, kiuj devigis ter-renton, per konfuceaj vortoj "Vi estas riĉa sed malhumana". Ankaŭ la kolportistoj riproĉis uzuristojn per samaj vortoj. Aŭdiĝis ankaŭ mallaŭdoj de popolanoj pri ĉantaĝantaj ŝtatoficistoj — "humanaj kaj moralaj en la buŝo, sed hipokritaj kaj malicaj en la koro." Pli kaj pli multaj ĉinoj akceptis la ideon de Konfuceo, ili monhelpas mizerulojn, subtenas malfeliĉulojn... Similaj ekzemploj ne mankas. Mi opinias, ke konfuceanismo helpas pliboniĝon de la sociaj moralaj.


Konfuceo estis etikisto. Por harmoniigi la homajn interrilatojn li elpensis sistemon de familiaj kaj sociaj etikaj principoj. Koncerne la rilatojn inter la suvereno kaj subuloj, li proponis, ke la subuloj estu lojalaj al la suvereno kaj la suvereno ĝentile traktu siajn subulojn. Koncerne la rilatojn inter la familianoj, li insistis, ke la patro amu la filojn kaj la filoj respektu kaj obeu sian patron; la pli aĝa frato amu la junan, kaj la juna respektu la pli aĝan; la geedzoj vivu intime kiel fiŝo kaj akvo. Li insistis ankaŭ, ke la amikoj konfidu unu alian. Miloj da jaroj pasis,

oni observis tiujn principojn, kiuj poste fariĝis belaj moralaj de la ĉina nacio. Kvankam parto de tiuj principoj jam arkaikiĝis, tamen la principoj respekti gepatrojn, ami gefratojn, intime kunvivi kun edz(in)o, konfidi amikojn, estas necesaj en ajna epoko. La etikaj principoj de Konfuceo ankoraŭ estas vivipovaj.

En la nuntempa socio multaj ĉinoj ne legis "Analektoj de Konfuceo", tamen ili respektas kaj obeas siajn gepatrojn. Oni devas atribui tion al la influo de la familia etiko de Konfuceo. La ĉinoj havas la virton respekti kaj obei la gepatrojn, se ne, ili estos mallaŭdataj de la publiko. Mia pli aĝa frato estas kamparano. Li lernis nur en elementa lernejo kaj neniam legis "Analektoj de Konfuceo", tamen li tre bone scias la obeemon proponitan de Konfuceo. Li ofte diris al mi: "Nia patro mortis frue kaj patrino vartis kaj edukis nin malfacile. Nun ŝi estas maljuna kaj malsana kaj ni, ŝiaj filoj, devas rekompenci ŝin." Li diris al mi: "Vi laboras en Pekino, bonvolu sendi monon por ŝiaj manĝaĵoj kaj vestoj, kaj mi zorgu pri ŝia ĉiutaga vivo." Li tion faris kaj faras. Mia patrino estas kolere, tamen mia frato neniam plendis pri tio kaj ĉiam afable traktas ŝin. Foje mi invitis lin viziti Pekinon, li rifuzis, dirante, ke ĉar nia patrino estas maljuna, li ne volas lasi ŝin sola en la hejmo. Mi estis kortuŝita. Li observis la Konfucean principon: "Dum la gepatroj vivas, la filoj ne devas vojaĝi malproksimen. Se por li estas nepre necese vojaĝi, la vojaĝo devas havi fiksan celitan lokon."

Konfuceo pledis ankaŭ por la homa memkulturo. Li diris: "Kiam vi vidas homon bonan, pensu pri egaliĝo al li; kiam vi vidas homon nebonan, faru al vi memkzamenon." Dum memkzameno oni devas koni sian eraron kaj korekti ĝin. Konfuceo opiniis, ke pro senĉesa korekto de la eraroj oni povas perfektigi sin mem kaj fine atingi la "Noblulan Karakteron" — kombiniĝon de klereco, humaneco kaj kuraĝeco. Ĉinaj intelektuloj kaj ordinariaj popolanoj estas influitaj de lia doktrino, en kiu ili konsciis kiel memkulturi kaj konduti.

Katenite de la historiaj kondiĉoj la doktrino de Konfuceo havas ankaŭ sian negativecon. Ekz. Konfuceo malestimis virinojn, li diris: "Se vi intime traktas la virinojn, ili ne respektas vin; alie, ili malamas vin." Pro subtakso de la virinoj, neniu virino troviĝis inter liaj disĉiploj. "Respekti viron, sed malestimi virinon" estas feĉo de la ĉinaj tradicioj. En longa tempo de feŭda socio virinoj ne rajtis esti klerigitaj, nek partopreni en la ŝtataj aferoj. Oni povas diri, ke tion kaŭzis ankaŭ la doktrino de Konfuceo. Li proponis solenan funebraĵan ceremonion kaj luksan entombigon por montri respekton al la forpasintaj gepatroj. Luksaj funebraĵoj tre malŝparigas. Tio estas tute ne necesa. Nun en la ĉina kamparo, tombejoj okupas pli kaj pli da agroj, tio fariĝas socia problemoj urĝe solvenda. ■



La aŭtoro (dekstre) kaj E-kursanoj

AŬGUSTE de 1994, mi veturis en la urbon Yangzhou, Jiangsu (Ĝjansu)-provinco, por viziti miajn edzinon kaj 3-monatan filinon. Laŭ invito mi instruis Esperanton duonmonaton en la Yangzhou-a Mezlernejo. En la E-kurso lernis 18 geknaboj. Dank' al ili, mi konis ion pri la vivo de hodiaŭaj mezlernejoj en someraj ferioj.

La Yangzhou-a Mezlernejo estas fama en- kaj eksterlande. El ĝiaj diplomitoj 2 fariĝis ĝeneralaj vicsekretarioj de UN kaj 22 — membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. La nuna prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko Jiang Zemin (Ĝjang Zemin) iam lernis tie. Multaj ambiciaj geknaboj deziras studi en tiu lernejo, sed ili devas sukcesi en rigoraj ekzamenoj. Nuntempe 2 000 geknaboj studas en 40 grupoj de la 6 klasoj de la lernejo. Komprenoble ilia lernado estas intensa. Kiel ili pasigis siajn somerajn feriojn? Jen respondo de kelkaj E-kursanoj.

Cui Yu (knabino): Ĉiutage mi ellitiĝas en la 7-a kaj duono. Post tio mi ekzercas mian korpon kaj iam faras gimnastikon laŭ televido. Poste mi faras hejmtaskojn kaj legas. Posttagmeze mi siestas aŭ rigardas televidan programon. Vespere mi promenas kune kun miaj gepatroj aŭ distras min en amuzejo kune kun miaj kamaradoj. Komence de la someraj ferioj mi lernis en fizika kurso 10 tagojn.

Xu Yang (knabino): Kutime mi malfrue en- kaj ellitiĝas. Tage mi faras hejmtaskojn kaj legas romanon. Vespere mi rigardas televidan programon ofte ĝis la 11-12-a. Ĉar mi ŝatas literaturan verkadon, mi ofte legas literaturajn verkojn ĉinajn kaj alilandajn en la someraj ferioj. Mi ankaŭ babilas kun amikoj en libertempo.

Fan Weixia (knabino): Mi ellitiĝas je la 8-a kaj

WANG HANPING:

Mezlernejoj en someraj ferioj

duono ĉiutage. Antaŭtagmeze mi faras hejmtaskojn, televidas infanajn programerojn. Krom tio, mi legas librojn kaj gazetojn. Mi ne faras sieston. Interesate de lingvoj, mi vizitas la E-kurson en la someraj ferioj.

Guo Bing (knabino): Ankaŭ mi ellitiĝas malfrue. Post plenumado de hejmtaskoj, mi rigardas televidajn filmojn, ĉar mi ne havas tempon rigardi ilin en la semestroj. Post siestado mi vizitas ĝardenon, kinejon, aŭ magazenon. Kelkfoje mi legas ĵurnalojn kaj tajpas. Mi volis vojaĝi aliloke, sed mi ŝanĝis la decidon pro varmeĝo.

Yang Yue: Kiel kutime mi ellitiĝas je la 5-a kaj duono. Matene mi legas ĉinan literaturon kaj verkon en fremda lingvo. Poste mi faras hejmtaskojn. Posttagmeze mi legas libron aŭ rigardas televidan programon. Kelkfoje mi vizitas miajn kolegojn por ludi kartojn aŭ ĉinan ŝakon. Antaŭ vespermanĝo mi ludas korbopilkon unu horon kaj duonon. Kiel vicprezidanto de la Lernanto-asocio de la Yangzhou-a Mezlernejo, mi partoprenis la Konferencon de la Tutlanda Studenta Federacio en Pekino de la 15-a ĝis la 25-a de julio. Kelkajn tagojn post tio, mi lernas Esperanton en nia kurso. Mi ŝatas legi. Ĉar lingvo estas instrumento, mi opinias, ke Esperanto certe estos utila estontece. Post la E-kurso mi vizitos fizikan kurson. Mi volas daŭrigi mian natur-sciencan lernadon en universitato kaj fariĝi esploristo-studento. Mi estas ankaŭ speciala raportisto invitita de la Yangzhou-a Radio-stacio.

Sun Yong: Ankaŭ mi ellitiĝas je la 5-a kaj duono. Unue mi faras 5 000-metran kuradon en la Yangzhou-a Stadiono kaj poste ludas volanon duonhoron por maldikiĝi kaj fortikiĝi. Je la 8-a mi revenas hejmen kaj prenas matenmanĝon post duŝado.

Post aŭskulto de novaĵoj dissenditaj de radio, mi faras hejmtaskojn ĉin-lingvan, matematikan, angla-lingvan, fizikan kaj kemian. Je la 11-a kaj duono, kiam miaj gepatroj hejmenrevenas de laboro, mi jam finkuiras rizon. Kaj la pladoj devas esti preparitaj de miaj gepatroj. Post siestado mi aŭskultas radion, legas libron en la angla lingvo. Kelkfoje mi vizitas miajn avinon kaj onklon. Kiam mia frato revenas de laboro je la 18-a kaj duono, ni kune iras al naĝejo. Vespere mi rigardas televidan programon kaj enlitiĝas je la 22-a kaj duono.

Kong Lei: Ĉiutage post ellitiĝo antaŭ la 7-a, mi legas en la angla lingvo ĝis la 8-a. Post trinkado de bovina lakto, mi faras hejmtaskojn kaj relernas la lecionojn. Ĉar mi ne bone lernis en la lasta semestro, miaj gepatroj kaj instruistoj estas malkontentaj je tio. Posttagmeze mi legas, rigardas televidan programon kaj halteras. De la 17-a ĝis la 18-a kaj duono mi faras sporton eksterdome, ekz. fari 2 000-metran kuradon kaj ludi piedpilkon. Vespere mi rigardas televidan programon, precipe pri militaj aferoj. La filmoj pri la kontraŭfaŝisma milito multe interesas min. Kelkajn tagojn antaŭe mi vizitis miaj 2 kuzoj el Nankino kaj mi akompanis ilin en ekskurso. Ankaŭ mi iros al Nankino en la venontaj tagoj.

Hua Minglei: Mia hejmo estas en la fabriko, kie laboras miaj gepatroj. Tie estas korbopilkejo. Ĉi-matene mi ellitiĝas je la 4-a kaj duono kaj ludas korbopilkon unu horon. Ĉar estas tre frue, mi ludas sola. Antaŭtagmeze mi legas kaj faras hejmtaskojn. Tagmeze mi rigardas televidan programon. Posttagmeze mi naĝas. Vespere mi rigardas televidan programon, vizitas kinejon aŭ ludas kartojn kun miaj kunlernantoj. Je la 22-a kaj duono mi enlitiĝas. Por mi la someraj ferioj estas agrablaj. Julie mi tajpis por komerca kontrolo buroo 2 horojn ĉiutage, senrekompence.

Yang Bo: Mi malfrue en- kaj ellitiĝas. Ĉar la semestraj tagoj estas ĉiam streĉaj kaj en la someraj ferioj mi devas bone ripozi. Antaŭtagmeze mi faras hejmtaskojn, legas amuzajn legaĵojn aŭ famajn verkojn. Posttagmeze mi rigardas televidan programon kaj ludas muzikilon *geng-o*, kion mi lernis en la infaneco. Nun mi ludas ĝin nur en ferioj, ĉar en la semestroj mi ne havas tempon. Fine de julio mi partoprenis someran tendumon. Komence de la someraj ferioj mi estis ĝoja, sed poste mi sentas enuon.

Zhang Ye (knabino): Ĉiutage mi ellitiĝas je la 6-a. Post tio mi legas, faras hejmtaskojn kaj relernas lecionojn. Posttagmeze mi siestas, legas postlecionajn librojn, far-

as naĝadon aŭ amuzadon kune kun miaj kolegoj. Vespere mi rigardas televidan programon, vizitas amikojn aŭ vesperan foiron. Kutime mi enlitiĝas je la 22-a. Komence de aŭgusto mi vojaĝis aliloken unu semajnon.

Dong Qi (knabino): Kiel kutime mi ellitiĝas je la 6-a. Antaŭtagmeze de la pasintaj tagoj mi lernis en iu komputoro-kurso kaj nun lernas en E-kurso. Posttagmeze mi faras hejmtaskojn. Vespere mi rigardas televidan programon. Mi volis vojaĝi aliloken, sed mi rimarkis, ke la someraj ferioj estas mallongaj, mi do ŝanĝis la decidon. Mi ŝatas legi romanon kaj ludi gitaron. Meze de julio mi partoprenis la kantadon organizitan de la lernejo por festi la 50-jaran jubileon de venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Sui Jia (knabino): Mi ellitiĝas je la 6-a kaj duono, iom pli malfrue ol kutime. Matene mi legas en la angla lingvo. Poste mi faras hejmtaskojn. Posttagmeze mi rigardas televidan programon, legas librojn kaj faras naĝadon. Mi partoprenis ankaŭ kantadon kaj lernis en la komputoro-kurso. Mi ŝatas kanti, danci, pentri kaj ludi tablotenison. Mia patro ofte oficvojaĝas, pro tio mi devas fari mastrumadon en la someraj ferioj.

◇ ◇ ◇ ◇ ◇

De la supre diritaj mi konis, ke ili vivas ne facile eĉ en la someraj ferioj pro plenumo de la taskoj donitaj de la lernejo kaj premo far la gepatroj. Sed ili ankoraŭ sentis sin pli ĝojaj ol en la semestro. Tiuj 14-18-jaraj mezlernejoj plejparte estas solinfanoj, sur kiujn iliaj gepatroj metis grandan esperon. Ili deziras, ke la infanoj diligente lernu por granda sukceso en la estonteco. Kompreneble, tiuj mezlernejoj malmulte faras hejmajn laborojn. Ili plejparte havas altan idealon, ekz., fariĝi tradukisto, kuracisto, advokato, administranto k.a. en la estonteco. Ili ankaŭ deziras korespondi kun alilandaj junaj esperantistoj. ■

Esperanta konversacio



KURANTAJ AFEROJ

EKONOMIO

● Estis lanĉita en Ŝanhajo alumina aŭtomata pasaĝerŝipo Nan Xing kun akvoaloj, farita de Ĉinio.

La ŝipo povas enteni 300 pasaĝerojn kaj la rapido estas pli ol 80 km hore. Ĝia samspeculo Bei Xing servas sur la linio inter Hongkong kaj Aomen. Koncerna departemento raportis, ke en la mondo nur Usono kaj Japanio povas fari tian ŝipon.

● Longhua-gubernio de Hebei-provinco sukcesis kulturi rizon per putoakva irigacio en sia seka kamparo. Nun pli ol 1 000 hektaroj da kampoj donis riĉan rikolton de rizo en sinsekvaj jaroj, kaj iuj vilaĝoj rikoltis 6 000 kg. da rizo sur ĉiu hektaro. (Liu Kejun)

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Kotonkapsulaj vermoj damaĝas katastrofe. Ĉiujare Ĉinio suferas perdon de 6 miliardoj da juanoj (8.3 juanoj egalas unu usonan dolaron) pro damaĝo de la vermoj. Kaj ĉiujare la ĉinoj elspezas 1 200-1 800 juanojn por insekticido por ĉiu hektaro da kotonaj kampoj. Tial, esplorado de kontraŭverma geno-inĝenierio estas enlistigita kiel grava scienc-esplora temo de la ŝtato. Dank' al la subteno de la Agrikultura Ministerio kaj la Agronomia Akademio de Ĉinio, esploristo Guo Sandui de la Bioteknika Esplor-centro sub la akademio penis 5 jarojn kaj sukcesis enkonduki en kotonon sintezan bacilon. Per tio li metis firman bazon por plena elimino de damaĝo de kotonkapsulaj vermoj kaj faris Ĉinion la dua lando, kiu posedas tiun teknikon.

● Fojno el riza pajlo, pere de maŝino, fariĝis manĝoskatolo post 4 sekundoj. La maŝino estis produktita de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Wuhan, Hubei-provinco. Ĝi turnas pajlon de rizo, tritiko kaj kotonujo en tre idealan surogaton de plasta spongo.

La vaste uzata plasta spongo inventita en la 70-aj jaroj multe faciligis la ĉiutagan vivon, sed ĝi detruis riĉfontojn kaj medion, ke oni nomas ĝin katastrofa blanka poluo.

● Astronomoj de la Pekina Observatorio

sub la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis en 1995 11 planedoidojn pere de teleskopo kun diametro de 2.16 metroj. La trovo havis gravan sciencan signifon.

● Dunhuang de Gansu-provinco sukcesis en kulturado de verdeta koton.


Kolora koton havas naturajn kolorojn post maturiĝo, povas elteni sekecon kaj sterilecon de grundo. Antaŭ teksado ĝi ne bezonas kolorigadon, tial la koton povas malaltigi koston de produktado kaj tekstilado. Nun Usono, Hindio, Argentino kaj aliaj 17 landoj kulturas koloran kotonon.

● La Agronomia Instituto de Hangzhou de Zhejiang(Ĝeĝjang)-provincio ricevis per selektado relative fortan regeneran specion de rizo el serio da frua rizo kaj hibridita rizo kaj nomis ĝin "Zaisheng n-ro 1". Tia rizo povas rekreski post falĉo, kaj sur ĉiu hektaro da kampoj oni rikoltis 6 000 kg da frua rizo kaj 5 100 kg da regenera rizo.

KULTURO

● Antaŭ nelonge okazis en Langfang de Hebei-provinco la ekspozicio de kaligrafio de s-ro Liu Shude, prezidanto de la Brazila Asocio de Ĉina Kaligrafio.

S-ro Liu naskiĝis en Taiwan-provinco kaj transloĝiĝis en Brazilon en 1976. De la infaneco li ŝatis kaligrafion kaj senĉese sin ekzercis per En la Pekin-opera Teatro Liyuan



kaligrafado dum dekoj da jaroj. La ekspozicio montris liajn 90 kaligrafaĵojn en diversaj stiloj. (Huang Dongyou)

- Oktobre de 1995, la Pekin-opera Teatro Liyuan celebris la kvinan datrevenon de sia fondaĵo. En la pasintaj 5 jaroj la teatro prezentis 2 000-foje kaj akceptis ĉirkaŭ milionon da ĉinoj kaj alilandanoj.

En la teatro oni prezentas ekskluzive pekinan operon. Pere de pekina opero oni povas koni la kulturon kaj historion de Ĉinio.

- Antaŭ nelonge oni lokis sur la suda bordo de Taihu-lago en Huzhou de Zhejiang-provinco kuŝantan feran budhon, la plej grandan en Azio,



Parto de la kuŝanta fera budho

kiu longas 19 metrojn, altas 4.5 metrojn kaj pezas 21 tunojn. La statuo estas projektita de la Ŝanhaja Ole-skulpta Instituto kaj farita de la Metiarta Fandejo Jimei (Ĝjimej) de Wuxi (Uŝji).

ARKEOLOGIO

- Antaŭ nelonge s-ro Zhou Nanquan (Ĝoŭ Nanĉjŭan), ĉina ekspertizisto pri antikvaj jadaĵoj, trovis en Hongkong ŝtatnivelan historian objekton "Okcidentlanda reĝo en aprecado de jadaĵo".

La jadaĵo longas 13.5 cm, larĝas 11.1 cm kaj dikas 1 cm. Sur

ĝi la okcidentlanda reĝo kun krispaj haroj kaj hoka nazo sidas sur tapiŝo kun krucitaj kruroj kaj aprecas jadaĵon, kaj ambaŭflanke de la reĝo staras po servisto kun teo en la manoj. S-ro Zhou diris, ke la materialo de la jadaĵo produktiĝis en Hotan de Xinjiang (Ŝingĵang). Li supozis, ke la artaĵo estis farita laŭ ordono de imperiestro de Tang-dinastio (618-907). Ĝi pruvis la prosperon de la dinastio kaj oftan interkomunikiĝon de Ĉinio kun la eksterlando.

- Metala fajrilo farita antaŭ 3 000 jaroj estis trovita lastatempe en antikva tombo en Fufeng-gubernio, Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco. Ĝi estas la plej frua instrumento, trovita en Ĉinio ĝis nun, por akiri fajron de la suno.

Oni faris ĝian reproduktaĵon kaj metis ĝin sub la sunon. Post 3-5 sekundoj la objekto sur ĝia fokuso ekbrulis. Ĝi estas ege valora por arkeologia esplorado.

MEDIPROTEKTO

- Elafuro (*Elaphrus*), kiu originis en Ĉinio kaj pereis en ĝi pro diluvo kaj militado, estis enkondukita el Britio en 1986. Kaj nun en la elafura bredejo de Dafeng-gubernio, Jiangsu (Ĝjansu)-provinco, la nombro de elafuroj kreskis de 39 en 1986 al 233. En la bredejo vivas la plej granda duonsovaĝa elafuraro en la mondo.

Elafuroj en la bredejo



Masaĝo en la ĉiutaga vivo (IX)

KONTRAŬ HIPERTENSIO

Hipertensio estas unu el la simptomoj de kordio-vaskulaj malsanoj. Ĝi atakas ĉefe maljunulojn kaj dikulojn. Ĝi okazas de multaj kaŭzoj, tial oni devas kuraci ĝin de multaj flankoj. En kuraco de hipertensio la masaĝo sur iuj akupunkturaj punktoj kaj *ĝinglŭo*-vojoj estas efika iagrade.

I. MASAĜO FAR ALIAJ HOMOJ

(1) La malsanulo kuŝu surventre kun nuda dorso kaj vi, la masaĝanto, puŝu viajn fingrojn kaj manplatojn laŭ la spino de la malsanulo de lia nuko al liaj dorso kaj talio pli ol 10 fojojn ĝis ruĝiĝo de la dorso (Bildo 1).

(2) Metu viajn dikfingrojn sur la akupunkturajn

punktojn *jongĉjŭan* sur liaj piedkavoj (Bildo 2) kaj forte puŝu viajn dikfingrojn al liaj piedfingroj po 100 fojojn. Tiu masaĝo estas utila por malstreĉi la kapon kaj mallevi la sangopremojn je 10-20 mm.


(3) La malsanulo sidu sur seĝo kaj vi staru malantaŭ li. Per viaj du dikfingroj premu de supre malsupren liajn akupunkturajn punktojn *fengĉi* kaj *fengfu* respektive (Bildo 3).

(4) Metu viajn fingrojn kaj manplatojn sur la frunton de la malsanulo kaj puŝu ilin al lia verto. Daŭrigu vian puŝadon preter la okcipitojn ĝis la arterioj ambaŭflanke de la kolo. Faru tion 10-20 fojojn (Bildo 4). Ĉesigu la masaĝon, kiam la malsanulo sentas sin malstreĉita. Faru tion 1-2 fojojn ĉiutage.


II. MEMMASAĜO

(1) Ĉiutage antaŭ la enlitiĝo kaj post la ellitiĝo premknedu la akupunkturajn punktojn *jongĉjŭan* tiamaniere, kiel montrite en (2) de la unua parto de la teksto.


(2) Metu viajn fingrojn kaj manplatojn sur la frunton kaj puŝu ilin supren de la verto ĝis la okcipitoj. Daŭrigu vian puŝadon ĝis la akupunkturaj punktoj *ĝjangjagoŭ* kaj *fengĉi* (Bildo 5). Metu la eksterajn flankojn de viaj manoj sur la du flankojn de la kolo kaj puŝu ilin malsupren. Premu la kolajn arteriojn, movu la manojn al la antaŭa parto de la brusto. Faru tion 10-20 fojojn ĝis la malstreĉiĝo de la kapo. ■



Bildo 1
Masaĝo de sakrospinaj muskoloj




Bildo 2
Puŝ-knedo de la akupunktura punkto *jongĉjŭan*



Bildo 3
Puŝ-knedo de la akupunkturaj punktoj *fengĉi* kaj *fengfu*




Bildo 4
Puŝ-premo de nukaj arterioj



Bildo 5
La akupunktura punkto *ĝjangjagoŭ*

HU YUN:

Mistera Lugu-lago



Pirogo

ANTAŬ multaj jaroj mi informiĝis pri Lugu-lago, kiu situas en montaro ĉe la limo de la provincoj Yunnan kaj Sichuan. Ĉe la lago loĝas indiĝenoj — mosuo-oj, kiuj havas originalajn morojn. Ju pli mi imagis la lagon, des pli ĝi misterigiĝis en mia kapo.

FAMILIOJ ĈELAGAJ

Aŭtomobilo iradis laŭ la senfina montvojo, vespere ni atingis la lagon. La blua kaj klara lago kviete kuŝas en la sino de la mon-

toj. La aero estis freŝa kaj mi avide enspiris ĝin.

Loĝas en Ĉinio ĉ. 50 mil mosuo-oj, kiuj antaŭ pli ol 2 200 jaroj ekloĝis ĉe Lugu-lago. La vorto “mosuo” signifas “homojn venintajn de okcidento”, do ili venis de malproksime. Nun ili apartenas al naŝia kaj mongola nacioj.

Vesperigiĝis, mi, scivolema pri la vivo de mosuo-oj, kun pošlampo en la mano iris en la vilaĝon. Ankoraŭ ne lumis elektro en Lige-vilaĝo, kiu sidas sur ĉelaga monto. Tie staras multaj lignaj domoj.

Mi iris en korton kaj laŭte demandis: “Kiu estas en la ĉambro?” Eldomiĝis knabino, kiu ŝajne ne scias paroli han-lingvon. Kun rideto ŝi invitis min endomiĝi. Estis malhele en la domo. Post

kelkaj minutoj miaj okuloj adaptiĝis al la malhelto. En domangulo glimis fajro neniam estingiĝanta. Unuloka lito sidis ĉe la muro. Ĉirkaŭ la fajro sidis ĉiuj familianoj kaj gastoj. Ankaŭ mi sidis ĉe la fajro. Poste mi sciis, ke oni ne rajtas sidiĝi laŭvole. Plejaĝulo en la familio devas preni la lokon en la mezo. Tiumomente tie sidis mastrino de la familio — la pli-ol-80-jara panjo He. Ŝia nigra supervesto paliĝis pro multfoja lavado. Ŝi ne bone parolas en han-lingvo kaj tiu sana maljunulino geste petis min manĝi fruktojn kaj bombonojn sur tableto. Revenis ŝia filo, kiu laboras en la gubernia urbo. Li bone parolas han-lingvon. Li sciigis min, ke mosuo-aj virinoj plenumas plejparton de la hejmaj laboroj. Plenkreskinte, li devas daŭre obei sian patrinon. Kiel onklo, li devas vivteni siajn genevojn. La knabino, kiu invitis min endomiĝi, estas lia nevino.

Mi komprenis, kial oni diris, ke mosuo-oj vivas en “lando de virinoj”, ĉar virinoj faras preskaŭ ĉiujn hejmajn laborojn. Oni daŭre loĝas ĉe la patrino eĉ post sia geedziĝo, kaj la patrinoj zor-

Mosuo-aj gejunuloj sin okupantaj pri turismo



gas pri siaj gefiloj kune kun siaj gefratoj.

VIRINOJ "LIBERAJ"

Matene de la sekvanta tago, mi iris boati al la insuleto sur la lago. Sur Lugu-lago 50 kvadratajn kilometrojn vasta troviĝas 5 insuletoj. Nur sur unu el ili estas templo.

La pirogo longas 3 metrojn kaj larĝas 1 metron. La lokanoj nomas ĝin "porka trogo". Ĝi iras rapide kaj stabile. Sidis sur la pruo mosuo-a knabino en rozkolora jupo kaj kun silkaj kapornaĵoj. Sur ŝia sunbruna vizaĝo brilis paro de klaraj okuloj. "Bonvolu kanti," mi petis. Ŝi ne hezitis, levis la kapon kaj ekkantis: "Rapide pasas tagoj post tagoj, kune ĝojas ni kaj gastoj..." Ŝia bela voĉo akordis kun la lir-lado.

Emocie la knabino kantadis, kaj la junulo, kiu sidis sur pobo, kun rideto rigardis ŝin. Li nomiĝas Aĝaŝi, aĝas 30 jarojn. Li sciigis min, ke se mosuo-aj gejunuloj amas unu la alian, do la junulo povas loĝi ĉe la knabino nokte. En la mosuo-a lingvo tiaj geamantoj nomas unu la alian "aŝja-o". Aĝaŝi sinsekve kuŝis kun 7 aŝja-oj. Li tute ne hontis, parolante pri tio. Laŭ la mosuo-a kutimo oni rajtas ŝanĝi sian aŝja-on, sed estas malpermesate kaj mallaŭdinde samtempe loĝi kun du aŝja-oj. Aĝaŝi havas konstantan aŝja-on, post kiam ĉi tiu naskis infanon. Liaj fratinoj portis donacojn al la infano por agnoski ke tiu estas ilia nevo. Nur tiam la gepatroj kaj najbaroj de la junulino sciis, kiu estas la patro de la infano. Nun li havas 3 infanojn, kiuj ne bezonas lian vivtenadon. Li ofte vizitas siajn infanojn kaj donas al la edzino ian helpon. Tio estas mosuo-a moro. Adiaŭante sian junan aĝon, ĝenerale dirite, oni havas konstantan aŝja-on.

"Fraĉjo, prenu la floron plej grandan, plej ruĝan. Memoru, sur du boatoj samtemp' ne staru."

La knabino daŭre kantis. Laŭ la mosuo-a kutimo, ne nur la viroj, sed ankaŭ la virinoj rajtas libere elekti sian aŝja-on plurfoje. Ili fermas sian pardonon al la viro ne plu plaĉa.

DIOJ ADORATAJ

Virinoj ludas ĉefan rolon en la mosuo-a socio. Ili nomas la monton ĉe Lugu-lago "Ina Monto" kaj la lagon "Patrino Maro en Montaro". Ŝajne ĉio ĉe Lugu-lago havas nuancon virinan. Tial iuj rigardas la lokon kiel "la lastan terenon de matriarka kulturo".

Sed pli detale koninte la vivon de mosuo-oj, oni trovos, ke ili havas ion pli adorindan ol virino.

En tiu ĉi izolita loko s-ro Ruheng Gongga estas erudicia. Li vizitis multajn lokojn eksterajn. Li konstruis belan "Mosuo-an hotelon" ĉe la lago por servi al turistoj kaj vizitantoj. En lia hejmo mi vidis nove aĉetitan televidilon. Maldika Gongga havas nur unu aŝja-on. Ĉar la familio de lia edzino bezonas lian helpon, tial li vivas en sia bopatra domo. Tio estas escepto en la loko. Se mosuo-oj loĝas en aliaj lokoj, ili do observas monogamion.

Gongga kredas je lamaismo. Ni vizitis la sutran halon en la dua etaĝo de lia domo. En la niĉo estis multaj budhaj statuoj kaj fotoj de religiaj gvidantoj. Lumis buteraj lampoj el kupro. La sutra halo estas pli luksa ol la gasteĉambro. Poste mi informiĝis, ke ĉiu mosuo-a familio havas sutran halon, ili kredas ne nur je lamaismo, sed ankaŭ je aliaj primitivaj religioj: Ili kultas dion de fajrejo por multiĝo de la familianoj, kultas prapatrinon antaŭ manĝoj, kultas dion de forno k.a.

Plej interesis min du kolonegoj en la gasteĉambro. La kolonego dekstra de la fajrejo estas "Ina kolono" kaj la maldekstra "Vira kolono". El tio mi rimarkis: kvankam mosuo-oj havas matriarkan koncepton, ili tamen komprenas, ke kompleta familio konsistas el viro kaj virino. ■



GALERIO


Pentraĵo "Ĉe Bianhe-rivero en la Festo de Klaro kaj Helo"

Teksto de RUAN HAIYING

Tiu ĉi silka pentraĵo estis farita de Zhang Zeduan, fama pentristo de Song-dinastio, dum 14 jaroj (1111-1125). Ĝi longas 528.7 cm kaj altas 24.8 cm.

La pentraĵo bildigas la kamparan pejzaĝon, la viglan komencon de la urbo Bianliang, (nun Kaifeng en Henan-provinco), ĉefurbo de Song-dinastio, kaj la ĉiutagan vivon de diversaj tavoloj de la socio. La pentraĵo havas vastan scenon kaj riĉan enhavon prezentitan per metodo de alta kondensigo kaj detala desegnado. Kiel komponaĵo, ĝi komenciĝas per softa fragmento kaj finiĝas per alta tono. Rigardante ĝin de la komenco ĝis la fino, oni havas fortan impreson kaj vastan terenon por imago. Ĉi tie estas parto de la verko.





En frosta vintro

Foto de DONG ZONGUI

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第二期
(本刊代号:二——九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2